


Bulgara **ESPERANTISTO**



1966

7-8

ŜTATA KOMBINUMO POR LANAJ TEKSAĴOJ „DIMITR BLAGOEV“

URBO KAZANLÂK



PRODUKTAS
POR LA ENLANDA KAJ LA
EKSTERLANDA MERKATOJ
FAJNAJN ŜTOFOJN KAJ ŜPINAĴOJN
EL GLATA FADENARO
EN MODERNAJ
ORNAMDESEGNAĴOJ kaj KOLOROJ.
ILIA ALTA KVALITO ESTAS
GARANTIATA DE LA
ALTA TEKNIKO DE LA
PRODUKTAĎPROCEDOJ!

Kovrilpaĝo: La loko „Gâbite“ (La fungoj) ĉe vilaĝo Beli plast, regiono de Kârĝali en Rodopi—montaro

Abonkotizo : jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro ; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv ; korespondanconoj : 5 stotinkoj por tiu vorto ; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Përmetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10—a.



LA UNUA TUTLANDA KONFERENCO DE BEA

Laŭ la ŝanĝoj de la Statuto, kiujn faris la 36-a kongreso en Pleven inter la kongresoj oni povas kunvoki tutlandan konferencon.

La 20-an de junio CK de BEA okazigis en Sofio la unuan tutlandan konferencon.

Ĝi pritaksis la faritan post la kongreso en Pleven praktikan laboron de la gvidorganoj kaj la societoj de BEA dum preskaŭ dujara periodo. Por unua fojo oni esploris ankaŭ la agadon de la novekreitaj laŭ la Statuto Disiriktaj Esperanto-Komitatoj, kiuj neniam ĝis nun ekzistis en la Bulgara Esperanto-movado kaj montras per la fakto mem de sia ekzisto novan momenton en la organizmetodoj de BEA.

La konferencon partoprenis delegitoj (po unu je 50 membroj) kaj gastoj. Ĉiuj havis la eblecon partopreni la diskutadon. Preskaŭ la triono de la delegitoj prenis la parolon kaj esprimis sian starpunkton rilate la tuŝitajn en la konferenco problemojn.

La ĉefa raporto „La nuna stato kaj la estontaj taskoj de BEA“ faris la Prezidanto k-do Nikola Aleksiev. Prelego pri la organizado kaj ĝisnuna rezultoj de la junularaj Esperanto-festivaloj en Bulgario faris la membro de BEA-estraro k-do Simeon D. Simeonov.

En la unuanime akceptita rezolucio oni legas:

„La Nacia Konferenco okazis ĉe cirkonstancoj kiam la bulgara popolo preparas sin inde renkonti la Naaŭan Kongreson de BKP, nia gvidanto kaj inspiranto, per novaj rimarkindaj verkoj en la ekonomio kaj kulturo de la lando.

La senĉesa streĉo en la sfero de la internaciaj rilatoj, provokita de la agresema politiko de la Usona imperiismo, trudas pliakriĝon de la antaŭgardeno en ĉiuj progresemaĵ kaj demokratiaĵ movadoj en la mondo kaj ĉe ni por evitigi la dangeron de nova milito.

La konferenco konstatas, ke plenumante la taskojn signitajn antaŭ proksimume du jaroj de la 36-a kongreso de BEA la E-movado en nia lando markis novajn sukcesojn kiel en la organiza, tiel ankaŭ en la kultura-eduka rilato kaj plialtigis sian aŭtoritaton en la socio kiel en la lando, tiel ankaŭ en eksterlando“.

Post vigla diskutado la Konferenco fiksas la estontajn taskojn de CK, DEK, la sociaj kaj sekciaj estraroj por la sekvanta periodo ĝis la 37-a Nacia Esperanto-Kongreso.

Je unua loko estas fiksita la tasko por plua stabiligo de BEA en orga-

niza kaj financa rilato kaj pligrandigo de la vicoj de la organizita bulgara esperantistaro.

Oni turnas la atenton al la neceso komenci varbadon de novaj membroj jam en la Esperanto-kursoj kaj aktive eltrovi la disiĝintajn neorganizitajn esperantistojn, por altiri ilin al sistema, celkonscia agado en la lokaj Esperanto-societoj en urboj kaj vilaĝoj.

Speciale al la distriktaj Esperanto-komitatoj oni donis la taskon pli intense kreadi novajn kaj reaktivigi iujn ne tre agemajn malnovajn societojn en sia distrikto.

Grandan atenton oni turnis al la p'ivigligo de la politika-eduka kaj kultura-kleriga agado en la societoj, apelacianta al ĉiuj esperantistoj amase aboni la aperintajn Esperanto-revuojn — „BE“, „NB“, „Paco“, „Int. Journalisto“, „Ripozoj“.

La konferenco aprobas la organizadon de kunvenoj de neesperantista publiko, en kiuj esperantistoj parolas pri sia sperto kaj impresoj dum vojaĝoj per la helpo de Esperanto. Tiuj kunvenoj donas grandan propagandan rezulton inter la larĝa publiko. Oni rekomendis ankaŭ pli intiman kunlaboron kun la ekzistantaj amasaj organizaĵoj kaj la porpacaj komitatoj en iliaj internaciaj kontaktoj kaj ligoj.

La tutlanda konferenco esprimis sian certecon — kiel montras tion la finvortoj de la rezolucio — ke „la bulgaraj geesperantistoj honore al la Naŭa Kongreso de BKP kontribuos por la solvo de tiuj plej neprokrasteblaj taskoj por esti certigita la plenumo de la Kongresa Rezolucio kaj por esti preparita kaj okazigita brile la sekvonta kongreso de BEA.“

Al energia laboro!

Nikola Aleksiev

MIA PRELEGVOJAĜO EN JAPANUJO

Neniu lingvo donas pli favorajn kondiĉojn por vojaĝi ol Esperanto. Esperanto estas grava faktoro por interkonatiĝo kaj kultura kunlaborado inter la popoloj. Dank' al Esperanto mi vojaĝis tra la tuta Eŭropo, prelegante pri Bulgario kaj gvidante Esperanto-kursojn dum la periodo 1929—1939 j. Dank' al Esperanto ankaŭ, mi ricevis invitleteron, okaze de la 50-a jubilea universala kongreso en Tokio, viziti la malproksiman kaj tre interesan landon Japanujo; resti du monatojn kiel gasto kaj fari prelegojn je temo: „Bulgario — lando de la rozoj“. Kiamaniere mi atingis la landon de la leviĝanta suno? Mi flugis per aeroplano rekte Sofio—Moskvo la 14-an de julio — 3 1/2 horojn; kvin tagojn mi restis en

Moskvo, por vidi la muzeojn, Kremlon universitaton, Tretjakov-bildgalerion k. t. p. La 19-an de julio mi traflugis proksimume 8,000 klm — Moskvo — Habarovsk per plej grandaj aviadiloj — 8 horojn. Tio estis emociplena vojaĝo: flugi super la nuboj, tra la tuta Siberio, rigardi sube la oceanon da nebulo kaj pli poste — la montarojn, riverojn kaj ebenajojn de orienta Siberio! De Habarovsk ĝis Nahodka mi veturis per rapida vagonaro; kaj de Nahodka ĝis Jokahama — per moderna ŝipo „Bajkal“ 53 horojn.

La 23-an de julio ni estis jam en Jokahama, granda haveno proksime de Tokio. Renkontis min du japanaj geesperantistoj. Per la ŝipo veturis anko-

kaŭ ses bulgaroj kaj bulgarinoj por la kongreso. Granda estis mia surprizo kiam mi vidis mian nomon skribitan klare inter la granda amaso de esperantistoj japanaj, venintaj por akcepti la gastojn. En Tokio mi restis kiel gasto en japana domo. Tiamaniere mi povis konatiĝi kun la japana hejma vivo, kun la japanaj kutimoj kaj kun la karakterizaj trajtoj de la japana popolo. De la unua tago, mi estis mirigita de la ideala pureco interne en la domoj. Ĉe la enirejo ĉiu devas demeti siajn ŝuojn kaj preni babuŝojn. Por ĉiuj japanaj hoteloj tio estas leĝo, aŭ pli bone — miljara kutimo. Nur en la eŭropaj hoteloj tiu ĉi kutimo ne gravas. En la domo, kie mi estis akceptita, oni donis al mi apartan ĉambron, la lito — sur la planko. Alia japana kutimo. Ĉiuj dormas sur la planko. Vespere — ĉiuj banas sin. Unue, la gasto, kaj poste ĉiuj anoj de la familio. Banejo ekzistas en ĉiu domo — de simpla baseno ĝis luksa. Ĉiam en varma akvo.

Post la bano, venas la vespermanĝo. La japana kuirejo estas tre interesa por la eŭropanoj. La japanoj manĝas kuiritan rizon — anstataŭ pano, legomojn, supojn, viandon k. t. p. Tre karakteriza trajto de la japanoj estas la granda ĝentileco, granda gastameco, estimo unu al alia ne per manpremado, sed per bela riverenco — unu al alia. La japana popolo estas laborema, progresema, honesta popolo kun miljara kulturo. Ĉiuj japanoj ŝatas legi, studi, labori. Analfabetaj homoj ne estas. Ĉiuj legas gazetojn kiuj estas presitaj ĉiutage en miloj da ekzempleroj. En iliaj librovendejoj vi povas vidi verkojn de ĉiuj klasikuloj el ĉiuj popoloj en originala lingvo kaj tradukitaj en japanan.

En Tokio mi restis 15 tagojn — unu semajno antaŭ la kongreso, kaj alian — dum la kongreso. Antaŭ la kongreso, mi havis eblecon konatiĝi kun la plej interesaj vidindaĵoj de la plej granda urbo en la mondo — Tokio. Gestuden-

toj gvidis min al la universitato, al la plej granda ŝintoista templo, al la plej alta turo, al la magazenoj k. t. p. Mi vizitis ankaŭ la bulgaran ambasadorejon. La Komitato por kulturaj ligoj kun eksterlando sendis 1200 librojn en Esperanto kaj en angla lingvo kiel donacon al japanaj E-societoj. Ili estis senditaj per ŝipo kaj venis malfrue, sed ili estis ricevitaj kaj dissenditaj al ĉiuj E-grupoj, kaj la anglaj — al ĉiuj guberniaj bibliotekoj.


La 50-a Universala Kongreso estis tre bone organizita, kaj bone vizitita. Ĝi estis grava kultura evento — unua universala E-kongreso en Azio, renkonto de oriento kaj okcidento. Tre impona manifestacio de la internaciaj pacmovadoj.

La 7-an de aŭg. mi forveturis al Kioto kaj Kameoka per la plej rapida vagonaro, kiu veturas 550 klm 3 $\frac{1}{2}$ horojn. La anglaj kaj usonaj inĝenieroj estis mirigitaj kaj iris rigardi la lokomotivojn. Japanujo estas granda industria lando — kun 100 milionoj da loĝantoj. Per sia industrio ĝi povas konkuri ĉie en la mondo. Famaj estas iliaj televidaparatoj, radioaparatoj, fotoaparatoj, transistoroj k. t. p. Ili estas bonkvalitaj kaj ne tre karaj. En Kameoka mi ĉeestis la E-festivalon de la pacmovadoj dum tri tagoj, post la kongreso en Tokio.

La programo de mia prelegvojaĝo estis preta dank' al S-ro Esumi el Kameoka—Oomoto centro. Li mem venis kun mi kiel tradukanto, ĉar la prelegoj estis vizitataj ankaŭ de neesperantistoj. La temo estis: „Bulgario lando de la rozoj“, kun diapozitivoj. Mi montris lumbildojn de la Valo de la Rozoj, de Varna kaj Burgas, de Rila kaj Rodopi — montaroj. Mi parolis ankaŭ pri Bogomilismo, pri Bulgario kiel kultura centro de la slavaj popoloj kaj pri nova socialisma Bulgario. Ankaŭ mi parolis pri la E-movado ĉe ni. Karakteriza trajto de la E-movado en Japanujo estas ke

tie ekzistas multaj universitataj profesoroj esperantistoj kaj ankaŭ multaj gestudentoj esperantistoj.

Mia prelegvojaĝo komenciĝis la 25-an de aŭgusto kaj daŭris ĝis la 8-a de septembro. Mi vizitis la grandajn urbojn: Hiroŝima, Kekura, Fukuoka, Hakata, Nagasaki, Saga, Kumamoto, Mijasaki, Ooita kaj Beppu. La tuta programo estis plenumita precize. Ĉie ni, kun mia amiko s-ro Esumi, tradukanto, sperta esperantisto, estis renkontitaj de la geesperantistoj ofte kun E-standardoj ĉe la stacidomoj, ĉie ni estis akceptataj kiel amikoj kaj fratoj en familioj aŭ en la hoteloj. Ĉie estis organizitaj kunvenoj de esperantistoj kaj oomotanoj — kune kaj aparte. Ĉie ni estis akompanataj ĝis la stacidomo kiam ni forveturis. Sed aparte mi devas substreki la bonan organizadon de la prelego en Kumamoto, Myasaki.



En Kumamoto: Antaŭ la gelernantoj

nacia nutraĵo. En Japanujo estas grandaj, kaj belaj urboj — industriaj centroj kaj grandaj havenoj — kiel Hiroŝima, Nagasaki, Fukuoka. Ankaŭ belegaj restadejoj kun tropikaj parkoj, bananoj apud la Pacifika oceano. Plej fama kaj plej interesa estas la banloko — Beppu — vizitata de multaj turistoj.

Plej fortan impreson al mi faris la japana popolo per sia miljara kulturo. La pureco kaj la afableco, la estimo al la homoj, la honesteco, la progreseco estas famekonataj. Kiel kapitalisma lando — kompreneble estas sociaj kontrastoj. Ekzistas grandaj riĉuloj kaj malriĉaj vilaĝanoj kaj laboristoj.

Ankaŭ mi devas noti, ke la pacmovado en Japanujo estas tre forta, ĉar la tragedio de Hiroŝima kaj Nagasaki ne estas forgesita kaj la muzeoj en ambaŭ urboj montras la terurajn postsekvojn de la atoma bombo.

Ĉie la japanaj geesperantistoj montris grandan intereson pri Bulgario, pri nia literaturo, kulturo kaj nova sociordo. Multaj donis siajn adresojn por korespondi kun bulgaraj geesperantistoj.

La plej granda gazeto — „Kioto-Šimbun“ publikigis artikolon „Mil libroj senditaj kiel donaco de Bulgario — per P. G. Pamporov — ĉiuj 1200 libroj dissenditaj tra la tuta lando estas portantoj de amikeco inter niaj popoloj.“

Mi neniam forgesos miajn travivaĵojn de la kora kaj frata akcepto. Mi dankas al ĉiuj japanaj geamikoj, kiuj helpis al mi dum mia prelegvojaĝo.

P. G. Pamporov



En Kumamoto: La bankedo

Ĉie niaj japanaj amikoj deziris montri al ni la vidindaĵojn, la belecojn de la naturo — ekz. la vulkano Aso apud Kumamoto, la nacia parko Uden — proksime de Nagasaki, la Budista templo apud Hiroŝima, la botanika kaj zoologia parkoj apud Beppu — nacia restadejo kaj fama banloko kun centoj da varmaj akvofontoj. Japanujo estas tre bela lando kun multaj montaroj — vulkandevenaj, sed kovritaj nun per belaj arbaroj. Ĉe la marbordo estas ebenaĵoj, ĉie bone kultivitaj kaj semitaj per rizo —

LEŬTENANTO TARANOV

(originala rakonto)

de Iv. Šivarov

Tra la malgranda fenestro penetris sunradio, lumigis la fumnigrigitan muron, ekglitis sur la tablon kaj haltis sur la kalendaro, makulita de muŝoj.

Aleksi Taranov saltleviĝis desur la lito, vestis sin rapide kaj eliris ekstere. La hundo ĝoje eksvingis la voston kaj kajole proksimiĝis al li.

— Bonan matenon, Juĉka! Bonan matenon! — li diris kareseme.

Respondante al la saluto, la hundo tirvoĉe ĝojbojetis plurfoje kaj kontente ekatendis sian matenmanĝon.

Malkompakta teramaso ĉirkaŭkovris la trunkbazojn de la vitoj, kies branĉoj pendis sur drato, etendiĝanta malproksimen laŭ longaj vicoj inter multnombraj palisoj.

Multajn jarojn jam la kontraŭrevoluciulo Aleksi Taranov estis gardisto de tiu ĉi vitkampo. Kvankam la aŭtuno garantiis al li trankvilan ripozon, nun Aleksi estis iel malkontenta, ĉar la tuta kamparo estis senhoma. Li ofte iris en la urbon kaj vizitis tie sian mastron, por preni manĝaĵon, por aĉeti ĵurnalojn kaj baldaŭ poste revenis en la kamparon, kie atendis lin la fidela amiko — la hundo. Tie, en la malgranda ĉambro de la dometo ĉiam oni povis trovi brandon kaj vinon.

Kiam la Ruĝa Armeo eniris Bulgarien, la malgranda grupo da kontraŭrevoluciuloj, kiuj estis fariĝintaj gardistoj en diversaj vitkampoj, maltrankviliĝis kaj komencis kolektiĝi sekrete kaj interparoli kaŝe. La sento de timo kaptis la koron de tiuj veindaj homoj.

La saman nokton Aleksi ne dormis. Longe li pensis kio povus okazi al li — la kontraŭrevoluciulo. Nur ĉe mateniĝo li povis iom dormi pro ekstremalaciĝo. Tiu ĉi tago, kvankam suna, por li estis malluma. . . Vekiĝinte, li tuj

direktis sin al la urbo. Tie ankoraŭ marŝis tra la stratoj longaj kolonoj de la Ruĝa Armeo. Aleksi haltis sur la trotuaro antaŭ la poŝtoŝtanco. Tie estis tri sovetiaj soldatoj, kiuj interparolis amike. Kontraŭ la poŝtoŝtanco en la lerneja korto estis soldatkamionoj inter kiuj paŝis oficiro.

Aleksi estis turmentata de nostalgio. Nevole li rememoris sian malĝojan vivon kiel soldato. Tiam ankaŭ estis milito. La soldatoj estis ofte transigataj de fronto al fronto. Poste okazis la revolucio. La disbatita reĝa armeo elmigris. La ŝipo haltis ĉe la bulgara marbordo. La cetera vivo de la kontraŭrevoluciuloj ne estas interesa.

Kaj jen nun Aleksi staras sur la trotuaro kaj atente aŭskultas la konversacion de la armeanoj. Li esplorigas ilin. La soldatoj tute ne similas al la iama disbatita reĝa armeo. Tiuj ĉi homoj estas bravaj viroj, viglaj kaj bone vestitaj. Ili estas gajaj, ĉar ili konstante venkas kaj antaŭsentas la finan venkon — la triumfon de la justeco. . . Ili interparolas en ukraina dialekto. Li ankaŭ estas ukraina homo.

— Taviŝĉ leŭtenanto, taviŝĉ Taranov! — ekkriis iu.

Aŭdinte la nomon „Taranov“, Aleksi ekstremis pro stranga emocio. En lia ukraina vilaĝo nur lia familio portas tiun ĉi nomon. Li ĵetis rigardon al la proksimiĝanta oficiro. Tiu alta frunto, tiuj dikaj lipoj, tiuj bluaj okuloj. . .

La oficiro ekparolis. Lia voĉo estis varma, agrabla, iel konata. . . Lia parolmaniero — malrapida, trankvila. Preskaŭ ĉiuj liaj familianoj parolis sammaniere.

La oficiro kaj la soldatoj interŝanĝis nur mallongajn frazojn. Aleksi kuraĝiis kaj demandis la oficiron de kiu regiono li estas. Aŭdinte sian patrolan-

dan lingvon en Bulgario, la oficiro ekĝojis kaj volonte tuj respondis.

Evidentiĝis, ke la oficiro estas de la vilaĝo de Aleksĭ. Stranga koincido! Nun li ekscios multajn novaĵojn. . . Post tiom da jaroj. . . Sed tie ĉi, sur la trotuaro, tute ne konvenas. . . Aleksĭ proponis al la oficiro viziti lian dome-ton en la kamparo, kiu estas tre prok-sime. La oficiro akceptis la inviton.

— Sed pli konvene estus, se ni trinkus kune el la plej bonkvalita vino. Ĉu vi akceptas veni en la vitkampon, kie mi havas bongustan brandon kaj vinon? — diris Aleksĭ kaj emfazis de-nove, ke la vitkampo estas tre, tre proksime de tie ĉi.

La oficiro akceptis tuj la proponon.

Pasinte preter la muelejo, ili eniris la vitkampon. Aleksĭ denove levis es-plorrigardon al la leŭtenanto. Li estis vestita en nova uniformo kaj novaj botoj. Aleksĭ estis malbone vestita kaj tial li iomete hontis. La konversacio komenciĝis bone, amike. La oficiro ra-kontis pri si mem, pri diversaj okaza-ĵoj dum la milito. Tute sincere li di-ris, ke li naskiĝis en la komenco mem de la Oktobra Revolucio. Post la na-skiĝo, lia patrino mortis. Li memoras nenion pri ŝi. Oni edukis lin en spe-ciala domo por orfoj, poste en pensiono kaj finstudinte gimnazion, li ricevis forpermeson por viziti sian vilaĝon. Tie li trovis nur sian onklinon, kiu ege ĝojis. Dum la konversacio ŝi kla-rigis al li, ke li havas patron, kiu estis kontraŭrevoluciulo kaj elmigris en Bul-garion. La onklino ricevis de la patro nur unu leteron el vilaĝo Gloĵene, en la regiono de Orjahovo.

Rakontinte tion, la oficiro eksilentis. Post mallonga paŭzo, li diris:

— Mi tralegis tiun leteron kaj ek-deziris posedi ĝin — kiel solan reme-moron, kiel memorobjekton de mia patro! Kaj mi prenis la leteron kaj forveturis. Poste mi studis en lernejo por tankistoj. Fariĝinte oficiro, mi ba-talis kontraŭ la malamikoj en Pollando

kaj Latvio. Post tio, tra Rumanio mi alvenis Bulgarion. Nun ni devas perse-kuti la malamikon ĝis Berlino. Ni ven-kos. Mi ne scias kio okazos al mi, tial mi deziris viziti vilaĝon Orjahovo, kiu estas proksime de tie ĉi. Mi de-mandos ĉu estas tie simila persono. Eble jes.

Dirinte tion, la leŭtenanto elpoŝigis zorgeme falditan paperfolion.

— Jen estas la letero! — li montris ĝin al Aleksĭ.

Rimarkinte sian propran leteron, kiun li estis iam sendinta al sia fra-tino, Aleksĭ ne plu povis retenigi sian grandan emocion. Li tuj sin ĵetis al la oficiro kaj plorsingultis. La oficiro re-tiriĝis iom mirigite kaj demandis kun serioza tono:

— Sed kio okazis, kamarado! Kial vi ploras?

Profunde kortuŝite, Aleksĭ demandis sin kiamaniere fari sian konfeson, kiel malkaŝi la veron. . . Poste, iom trank-viliĝinte, li diris kun tremanta voĉo:

— Tiu ĉi letero estas mia. Mi skri-bis ĝin. . .

— Strange! Kia feliĉa okazo! — respondis la oficiro kaj diris mirigite:

— Sed anstataŭ ĝoji, vi ploras. . . Mi petas, estu serioza! Ni ja estas viroj. La larmoj estas privilegio nur por la virinoj! . . .

Aleksĭ en profunda emocio pensis: Jen estas la filo! Lia propra filo! Kaj oficiro! Sovetia oficiro! Kaj bravulo kaj belulo! Trankvila, serioza leŭte-nanto Taranov. . . Li serĉas sian pat-ron. Kaj fine li trovis lin! Kaj kiel trankvile li rakontas: „Mi estas sove-tia oficiro, edukita de la Granda So-vet-Unio. Ni batalis por ĝi en multaj bataalkampoj kaj mi ĵuris oferi min por ĝi. Mi estas filo de la Oktobra Socia-lisma Revolucio. Mia vera patro estas Sovet-Unio. Mi sentas min feliĉa, ke la milito donis al mi la eblon partop-reni en la venko. Mi vidis ankaŭ mian fizikan patron. Li nun ploras — ĉu pro feliĉo aŭ pro bedaŭro! Sed nun mi

menion povas fari por li. . . La venko estas por mi la plej grava devo. Se post la fino de la milito mi restos viva, mi zorgos pri li. Se mi pereos, miaj amikoj faros ion por li. . .“

La saman vesperon la ruĝarmeanoj

forveturis. En la oreloj de la kontraŭ-revoluciulo Aleksi Taranov ankoraŭ sonas la vortoj de la leŭtenanto: „Mia patro estas Sovet-Unio. Ĝi edukis min. Ĝi faris min homo.“

(Premiita en la Literatura konkurso)

LATVIAJ ANEKDOTOJ

Dezirante antaŭgardi sian filinon kontraŭ edziniĝo, la patro konsilas al ŝi:

— Memoru, filineto mia, ke kiu knabino edziniĝas, tiu agas bone, kaj kiu ne edziniĝas, tiu agas ankoraŭ pli bone.

La filino respondas:

— Nu, paĉjo, mi deziras agi bone, kaj mi lasos la aliajn agi pli bone.

*

Svatantoj vizitis la fianĉinon. Pri ĉio oni kontraktis, ĉion oni aranĝis. Sed subite la fianĉino komencis plori. La patrino trankviligas la filinon:

— Ne ploru, karulino mia! Ĉiuj kna-

binoj ja edziniĝas. Ankaŭ mi edziniĝis iam.

— Sed vi, panjo, edziniĝis al paĉjo, dum mi nun devas edziniĝi al fremda homo!

*

Patrino instrukcias sian stultan filon:

— Kiam vi faras edziĝproponon, fileto mia, parolu „Ronde!“

Vizitinte domon de la fianĉino, la filo komencis:

— Rado, kapo, pomo, kukurbo, pizo, terpomo, sitelo, barelo, kuvo. . .

„Rondajn“ vortojn li plu ne sciis kaj forveturis returne kun nenio.

Esperantigis: N. I. Sigal, Odeso, USSR

УЛИЦИ „ЗАМЕНХОФ“ И „ЕСПЕРАНТО“ В КАРЛОВО

На 15 май в Карлово стана мило есперантско тържество. По случай наименованието на улици „Есперанто“ и „Д-р Заменхоф“ в града се събраха есперантисти от Пловдив, Асеновград, Карлово, Ръжево Конаре, Труд, Климент и др.

Есперантистите се отправиха за мястото, където се бяха събрали членове на 3-та Отечествонофронтовска организация с председателката Пенка Шопова. В техния район се намираща улица „Д-р Заменхоф“. Председателят на Окръжния Е-комитет в Пловдив Иван Шиваров запозна присъстващите с живота и творчеството на Д-р Л. Л. Заменхоф. На тържеството бяха рецитирани стихотворения „Ла войо“ и други от Заменхоф. Радостта на кварталците изрази др. Пенка Шопова. Тя каза, че хората, които живеят на тази улица, ще уредят добре улицата, ще направят домовете си образцови, ще уредят кът на улицата с лика на Заменхоф и ще започнат да учат

есперанто, а в кръжоците ще изучат живота и делото на Заменхоф.

След това в знак на благодарност Пенка Шопова поднесе на Иван Шиваров букет от ароматни рози.

Множеството се отправи към площад „Левски“. На запад от него се простира улика „Есперанто“. И тук се събраха много съквартилци. С приветствие към тях се обърна заместник-председателят на ГНС — Гечо Николов. Той поздрави гражданите от улица „Есперанто“ и им пожела да се запознаят добре с езика, за да могат да отговарят на идващите чужденци на обиколка из нашия край. Др. Шиваров ги запозна с историята на есперанто; той благодари на Градския народен съвет, който се отзова на призива на карловските есперантисти и взе решение да се преименуват двете улици. С това се подчертава, че Карлово е център на оживено есперантско движение.

А. Танев

LA LABORISTO

de *Hristo Smirnenski*

En frumateno kiam brulas orient'
en mar' de flamo orskarlata,
kun la amasoj palaj marŝas li kaj mem
pro sturmo flamas bruligata.

Sub liaj pezaj paŝoj la granita urb'
ektremas kaj vekigas kun kolero,
kaj verŝas sian krion la surstrata bru',
la krion de la hom-mizero.

Sed meze de la sulkoj sur malhela frunt'
ne montras sin dolor' kvieta —
en ili ĝermas la aler' grandega nun
kaj la minaco ŝtormimpeta.

Nun li ne estas obeema sklav'-pari',
la manojn delasinte sen konscio:
liberiginta Prometeo estas li
elsub la jugo de la dioj.

Tra l' frua matenruĝ' de l' nova tag'
alpaŝas li aŭdace kun solen' —
kaj al la homa gento en obskur kaj plag'
disĵetas fajrojn el ruben'.

1921

Tradukis: *At. Lakov*

LA KOLOMBINO

de *Stefan Kadiev*

Kolombo flugas tra la mondo tuta
kaj portas de la paco la statuton.
Kaj Zamenhof al la flugiloj forton donas:
Ne petas, nek admonas,
sed vokas la homaron trans landlimoj
kaj tiu vok' hardigas la animojn.
Ĉe la kolombo flugas kolombino —
de la kolomboj etaj la patrino —
multfoje pli fervora en la batal' por paco
en la tutmonda spaco.
En bono kaj malbono, en feliĉo kaj sufero —
en ĉiuj partoj de la tero,
ŝi flugas apud la kolombo
al li fidela ĝis la tombo.
Gratulas ni la kolombinon nian,
fidela restu ŝi al nia ago ĉiam,
ke vivu en konsento dum estonto
la homoj de la tuta mondo.

ESPERANTO

de *Ginka Krsteva*

La nokto estas senluna kaj malluma.
Simila noktoj estas multaj —
longaj kaj senfinaj —
kiel atendado.
Sed la mateno pri karesoj
vekiĝas.
La suno per spiro la teron
varmigas
kaj la birdoj tinte gaje
ekkantadas.
Printempo!
Unu fenestro hela
malfermiĝas.
Unu fenestro —
blankaj, flavaj, nigraj manoj
kolektiĝas.
— Aŭdu vi, sinjoroj
imperiistoj!
Via minaco kaj atomaj bomboj
ne nigrigos la printempon
de l' homoj.
Tiu ĉi printempo estas
la klara mateno. . .
Unu malfermita fenestro
al la mondo —
la fenestro de l' amikeco,
la fenestro de l' paco.

HAKILO KAJ FOSILO

(fablo)

de Stojan Mihajlovski

Fosilo rustiĝinta, ie forgesita,
demandis la hakilon: — He, pro kaŭzo kia
konstante brilas kapo via?
El fero estas ankaŭ mi ellaborita,
sed kial do al vi mi tute ne similas
kaj eĉ neniel brilas?
De kie venas inter ni la diferenco,
kaj mia rust' de kio estas konsekvenco? ...
Kaj la hakilo tiam
respondis: — Ĉiutage al arbar' mi iras
kaj hakas arbojn. . . La brileco
konservas sin per la laboro ĉiam.
Pro kio vi, amiko, miras?
Nur el labor' naskiĝas la beleco. . .

Tradukis: Simeon M. Simeonov

LA VERSAĴO „NEDISIGEBLAJ“ DE PENĈO SLAVEJKOV KAJ LA BULGARAJ POPOLAJ KANTOJ KUN LA SAMA MOTIVO

Dum la centjaroj nedisigeble kunigita kun la vivo de la bulgaro, nia popola kanto, spekulante lian vivmanieron, ĝojojn kaj suferojn, sentojn kaj aspirojn, kompreneble tute ne povis resti fremda al la bulgaraj poetoj. Komentante de Petko R. Slavejkov, Botev, Vazov kaj eĉ ĝis nun, ĝi vekis en ili vivan intereson, inspiris ilin, tiel per siaj motivoj, kiel ankaŭ per siaj artaj kvalitoj. Tion oni povas diri precipe pri nia eminenta verkisto Penĉo Slavejkov. Perfekta konanto de la bulgara popola kanto — pri kio atestas liaj studoj „La bulgara lirika kanto“ kaj „La lirika kanto“ — li kompilis bonegan kolekton da bulgaraj popolaj kantoj („Libro de la kantoj“), eldonia ankaŭ en angla traduko, sub la titolo „La Ombro de la Balkano“.

Li ne nur admiris la bulgaran popolan kanton, sed ankaŭ estis inspirata de ties motivoj, kiujn li reverkis en siaj versaĵoj kaj poemoj — „Pestuloj“, „Amatino de Drako“ k. a. Tia estas ankaŭ la okazo kun la konata lia versaĵo „Nedisigeblaj“, en kiu li profitis la popularan en la bulgara popola liriko motivo — la sufero de la junaj geamantoj, kaŭze de la malhelpoj kaj la malkonsento fare de iliaj gepatroj, kiuj estis kontraŭ ilia geedziĝo.

Lau sia enhavo, relative plej proksima al tiu lia versaĵo estas la popola kanto „Junul' kaj knabin' reciproke sin amis“ („Nedisigeblaj“), kies tradukon, kune kun tiu de „Nedisigeblaj“ ni prezentas aparte.

Penĉo Slavejkov ne kontentiĝis nur per la arta prilaborado de tiu popola kanto. Li sen-

cigis la enhavon, forigante la hazardan karakteron de l' morto de la junaj geamantoj. Li ŝanĝis ankaŭ la naŭvan finon de la kanto — la pereco de la kruelaj gepatroj pro la incendio, kaŭzita nevole de ili mem.

Sed en sia versaĵo P. Slavejkov rilate al la konflikto inter la amo de la gejunuloj kaj la malhelpoj fare de la gepatroj donas solvon tute fremdan, tiel al la popolaj konceptoj, kiel al la popola kanto (la sinmortigo de la geamantoj). En multaj popolaj kantoj kun la sama temo, la gejunuloj suferas, luktas, iufoje trovas ne sufiĉe sukcesan solvon de la konflikto, sed ĉiam ili defendas sian amon, eĉ kontraŭstarante al siaj gepatroj.

. . . Mia patrino maljuna,
mi kun li vivos du tagojn,
tri tagojn, poste malsatos,
sed edziniĝos al Venko!

Krom tio, la versaĵo de Penĉo Slavejkov vere estas skribita en bona ritmo, kia mankas en la originalo de la menciita popola kanto, sed la elektita de li versero — deksessilaba trokeo — faras lian version tre peza kaj malrapida, malgraŭ ties estetikaj kvalitoj. La ekspozono sonas monotone, per egala ritmo, ne konforma al la streĉiteco de la priskribita tragika evento. La novaj motivoj iufoje komenciĝas en la mezo de la strofoj (en lia versaĵo ĉiu verso prezentas du unuigitajn versojn), — strofoj 3, 11, 12, 13 kaj en strofo 13 — el la mezo de la linio.

Tiu ĉi malperfektaĵo de lia verso vidiĝas precipe kiam ni komparas ĝin kun la dinamika

kaj konciza verso de unu el la variantoj de la menciita popola kanto —

„Petolemaj gejunuloj
interamis sin pasie. . .“,

kies tradukon ni ankaŭ aldonas tie ĉi.

Kia matureco, lerteco kaj belsoneco radias el tiu mirinda (per sia fonetika lakoneco) popola kanto, pentranta la neŝancebleblan reciprokkan gejunulan amon, kiu estas preta serĉi tra la morto la unuecon, kiun la vivo surtera, pere de la obstinaj gepatroj, rifuzas al ĝi! La verso fluas kvazaŭ kuranta akvo, de iu klara monta rivereto.

Ne hazarde, sed per arta sento, la anonima popola kantisto elektis por sia verso la ok-silaban trokeon, kiu estis ŝatata esprimrimedo ne nur en la bulgara popola liriko, sed ankaŭ ofte alternis kun sep-, ses- aŭ eĉ kvin-silaba trokeo. Ĝi estis ankaŭ ŝatata formo de tiaj majstroj de la poezia stilo, kiaj estis la rusaj poetoj Lermontov („Malliberulo“, „La Donacoj de Terek“, „Kozaka Lulkanto“. . .), Tjutĉev, Balmont, Valeri Brjusov, Al. Blok k. a., kiam ili deziris efektivigi pli grandan muzikan esprimforton kaj dinamikecon de siaj versoj. Precipe Al. Blok ofte uzas tian versformon —

Ветер принес издалёка
песни весенней намек,
гдето светло и глубоко
неба открылся клочок. . .

Утихает светлый ветер,
наступает серый вечер. . .

Кто-то шепчет и смеется
сквоз лазоревый туман —
только мне в тиши взгрустнется
снова смех из милых стран! . . .¹⁾

- 1) Jen de fore vent' alportas
pri printempa kant' aludon;
ie lume kaj profunde
montras sin ĉiela peco. . .

Ĉesas jam la luma vento,
venas la vespero griza. . .

En nia arta poezio ankaŭ tiu verso estas tre populara, ĝin ofte uzis nia popola poeto Ivan Vazov:

Малко цвете съм в полето,
аз съм синия синчец. . .²⁾

Jen per kia esprimforto kaj melodieco sonas ankaŭ la konata versaĵo de R. Burns „To a kiss“—

Humid kiss of soft affections,
Tend' rest pledge of futur bliss,
Dearest tie of young connections
Love' s first snow-drop, virgin kiss. . .³⁾

Kaj nun, malgraŭ la polvo tavoliĝinta sur ĝi pro la tempo, la bulgara popola lirika kanto reaperas kun honoro kompare kun la plej artaj priskriboj de la amaj emocioj de la junaj geamantoj. Tio, kio ofte mankas al ĝi rilate al la artismo (la manko de metrikaj movoj, kaŭzita de la melodio dominanta super la metriko. . .), estas kompensita per la sento pri modereco de la popola kantisto, per la perfekta kono de la kortremoj en la animoj de la junaj geamantoj, per ilia freŝa kaj senprera sento. . .

La bulgara popola liriko — „nia plej granda nacia spirita riĉaĵo, nia plej kara nacia poetika posedo“, laŭ la opinio de Bojan Angelov, — meritas la intereson de la amatoroj de la vera poezio.

V. Slavov

Iu murmuretas, ridas
tie, tra l' nebul' lazura —
nur mi ree sopiradas
ridon el la lando kara! . . .

- 2) Mi floret' kampara estas,
blua estas mi cejan' . . .

3) Humila kiso de mildaj sentoj, amplenaj promesoj pri venonta feliĉo, plej kara ligo de gejunula korinklino, la unua neĝfloro de la amo, virga kiso. . .

Jen la aranĝoj de Pola Esperanto-Junularo, kiujn povas partopreni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj:

1. Internacia Tendaro en Funka: 25. VIII. — 5. IX. 1966.

Informoj: Andrzej Grzebowski, Bydgoszcz 9, Curie Skłodowskiej 10/1, Pollando.

2. Studenta Seminario en Lodz: 5—8. IX. 1966.

3. STELO-Seminaro en Torun: en aprilo, 1967.

NEDISIGEBLAJ

de Penĉo P. Slavejkov

Sur soleca bord' viburno staras svelta kaj gracia,
 kaj acero branĉojn plektas inter branĉetaro ĝia.
 Laciĝinte, por ripozi, mi en ties ombro sidis
 kaj sekreton sian tiel la viburn' al mi konfidis
 per susuro de l' folioj, dolĉa kaj korsubpremanta:
 — Junulin' mi iam estis en ĉi tiu mondo vanta.
 Suno hela de l' ĉielo min lumigis kun favoro.
 Sun' alia tamen brilis jam en mi, en mia koro.
 Tiu suno nek de alte nek de malproksime ardis —
 ĝi de la najbara korto min lumigis, min rigardis. . .
 Tage, nokte min rigardis Ivo el la blankaj kortoj,
 sed atingis min malĝoje liaj kantoj, liaj vortoj:
 „Vi ne ploru, amatino mia, ke al amo nia
 kontraŭstaras patro mia, same kiel panjo via!
 Vera am' kaj ĵurpromesoj por ni lig' eterna estas. . .
 Koroj de la geamantoj eĉ post morto kune restas! . . .“
 Estis la ĉagren' amara, sed parolis dolĉe Ivo.
 Tamen sort' alion juĝis: nin disigi dum la vivo. . .
 Foje de la font' revenis kun kaldronoj mi vespere,
 kaj rimarkis homamason sur la strato, kaj senpere,
 ĝuste antaŭ altaj pordoj, tie de la Iva korto.
 Tuj atingis min lamentoj, plej teruraj, tristaj vortoj:
 „Li mortigis sin kaj rekte tra la kor' tranĉilo pasis!“
 Ektréminte, mi kaldronojn de surŝultre fali lasis,
 tra la homamas' min ĵetis kaj traŝovis min kriante,
 vidis Ivon, vidis sangon. . . la tranĉilon eligante
 mi el lia kor' trapikis min ĉe l' doloranta koro
 kaj sur Ivon tiam falis mi kun antaŭmorta ploro. . .
 Lia patro, mia panjo ĝoju nun pri nia sorto!
 Mortaj, ni nin interamas por eterne en la morto. . .
 Amviktimojn ne enfosas oni en preĝeja korto —
 tie oni enterigas homojn jam dumvive mortaj —
 sur ĉi tiu bord' enfosis oni nin de val' serena.
 Ni elkreskis — mi viburno, li acero branĉoplena.
 Li brakumas min per branĉoj, mi lin ĉirkaŭvolvas forte;
 Korojn de la geamantoj ne disigas eĉ la morto.

Longan tempon en la ombro mi aŭskultis kun admiro
 kaj rakontis ĉion per la trista kant' de mia liro.

Tradukis: **Vasil Slavov**

NEDISIGEBLAJ

(Bulgara popola kanto)

Junul' kaj knabin' reciproke sin amis,
 naŭ jarojn sin ili adoris pasie.
 Jam venis la tempo por la geedziĝo.
 Ne estis konsenta la patro knabina,
 ke la geamantoj geedze sin ligu
 por vivon pasigi en kunekzistado.
 Li sian filinon irigis herbkampen,
 ke tie kolektu ŝi fojnon freŝverdan.
 Kaj ankaŭ l' junula patrin' ne konsentis
 ke la geamantoj geedze sin ligu

por kune pasigi la vivon surteran,
 kaj ŝi lin irigis al monta arbaro
 ke tie li haku aceran brullignon.
 Sed falis la arbo, mortigis l' junulon;
 venena serpent' la knabinon mortmordis —
 la du geamantoj samtage pereis
 kaj oni enfosis la bonan junulon,
 enfosis lin supre, ĉe lia vilaĝo;
 al li vidalvide — la junulineton.
 Elkreskis abi' ĉe l' vilaĝo malsupre,

kaj trans la vilaĝo acero elkreskis.
 La du arbopintoj sin baldaŭ klinis
 kaj super la vilaĝo sin interplektis.
 Sur ilin surflugis birdet' najtingalo
 kaj kantis vespere kaj frue matene.
 Birdet' najtingalo kantante parolis:
 — Damnita vi estu, patrin' de l' junulo!
 Damnita vi estu, ho patro knabina!
 En morto kuniĝis jam la geamantoj
 aj spite al vi kunvivados por ĉiam. . .
 L' junula patrin' kaj la patro knabina

en sia kolero la arbojn dehakis:
 la patro knabina — l' abion maldikan,
 l' junula patrino — la verdan aceron,
 kaj fajron ĉe l' rand' de l' vilaĝ', ekbruligis,
 por nepre cindrigi l' abion, l' aceron.
 La fajro direktis sin al la vilaĝo,
 la ŝtorm' ĝin ekpuŝis tra l' tuta vilaĝo
 kaj baldaŭ konsumis l' junulan patrinon
 kaj ankaŭ cindrigis la patron knabinan.

Tradukis: Vasil Slavov

PETOLEMAJ GEJUNULOJ (Bulgara popola kanto)

Petolemaj gejunuloj
 interamis sin pasie
 de junaĝo ĝis plenaĝo.
 Venis tempo por edziĝo.
 Ne konsentas pri l' edziĝo
 la patrino junulina
 kaj la patro de l' junulo.
 Al knabin' junulo diras:
 „Ho vi, eta junulino,
 ĉu konsentas vi, ke prenu
 mi alian amatinon?
 Ankaŭ mi ja ne konsentas,
 ke vi prenu aliulon!
 Nu, ni senprokraste iru

en la Tililej-arbaron,*
 kie birdo ne traflugas,
 nek traflugas, nek ĉirpadas.
 Mi estiĝos jun-acero,
 apud mi vi — sveltatio.
 Tiam venos ĉarpentistoj
 kaj kun siaj kurbhakiloj
 dehakinte l' jun-aceron,
 ankaŭ la abion sveltan,
 ili segos blanktabulojn —
 la aceraĵn ĉe l' abiaj,
 kaj ni ree estos ĉiam
 unu apud la alia. . .

* Tililej-arbaro — sorĉa, fabela arbaro.

Tradukis: Vasil Slavov

S-ANO VYTAUTAS SILAS EL VILNIUS, LITOVIO, INFORMAS

La 16—17-an de aprilo 1966 en la
 loka mezlernejo en Eleja, Latvio, oka-
 zis celebrado de jubileo de Riga junu-
 lara E-grupo „Estonteco“. Ĉi tie aŭ-
 tostopo renkontiĝis 12 riganoj kaj
 6 vilniusanoj. Promesis veni ankaŭ ge-
 samideanoj el Kaunas (Litovio), sed. . .
 Eble ilin timigis la malfavora vetero:
 plus 20°C en Litovio kaj 10 cm da neĝo
 en Latvio.

Kantoj, dancoj (nepre jam tradiciaj
 lenko kaj polko kun kornetoj) kaj . .
 toastoj. Nova E-kanto laŭ melodio de
 „Hali-kali“ oficialigis ĉetablan kisadon.
 Uzu dum E-renkontiĝoj:

Kiu en januaro
 (jam en aprilo)

(ĝuste en marto)
 benis teron per ven'
 levu glason kaj kisu
 la najbarojn sen ĝen',
 trinku ĝis fund',
 kisu sen ĝen', sen ĝen'.

S-ano Ervins Mozerts montris
 fotojn kaj rakontis pri agado de Riga
 E-junularo. Gaja akordiono senlace so-
 nigris E-melodiojn.

Ĉion kronis tradicia amika rondo:
 „Gis revido, dum majaj festoj en E-fe-
 stivalo ĉe Arimaičiu (Arimajĉju-lago)“.
 (La festivalo okazos 6 km de urbo
 Šeduva, direkton al Radviliškis, Lito-
 vio).

BLAGOEVGRAD. En la uzino por laŭparoliloj „Grozdan Nikolov“ oni fondis E-grupon. La grupo nombras 10 anojn. Tuj post la fondiĝo estis malfermita E-kurso kun kursgvidanto Nikolaj D. Graĥovski. **V. Taneva**

SEVLIEVO. Sukcese finiĝis la kurso por civitanoj gvidata de k-do Il. Ilijčev. En ĝi partoprenis 12 gejunuloj. Ili vizitis la VII festivalon en Loveč, kaj restis treege kontentaj de la bela programo kaj la bona akceptado de la mastroj.

La 20-an de aprilo okazis la tradicia printempa vespero. La junaj homoj festis kaj kantis esperante. Ili montris al malnovaj esperantistoj ke en nia urbo kreskas juna, vigla generacio. Ĝis malfrue en la nokto aŭdiĝis dancmelodioj kaj la voĉoj de gejunuloj.

En la frua dimanĉa mateno de la 15-a de majo 1966 grupo da geesperantistoj forveturis al la monaĥejo apud Drjanovo.



La aŭtobuso, ornamita per verdaj flagetoj traveturis urbon Gabrovo kaj direktis sin al la monaĥejo. La esperantistoj gaje kantis.

La monaĥeja korto estis plenplena kun gastoj. Tie ĉi okazis solenaĵo okaze de la 90-jara datreveno de la glora Aprila Ribelo. Post la solenaĵo la laŭparolilo anoncis: La geesperantistoj el la distrikto de Gabrovo kolektiĝu antaŭ la muzeo.

En amika atmosfero ni faris delonge preparatan elekton de Distrikta Komitato. En la estraron eniris: Stefka Markova, Maria Ivanova kaj Miĥo Ĝalábov.

Kontentaj de la bone pasigita tago kaj plensukcesa laboro, la geesperantistoj el la distrikto de Gabrovo ekveturis al siaj urboj.

B. Mandeva

SVILENGRAD. La jarkunveno de la E-societo „Nova mondo“ elektis la novan estraron en konsisto: prezidanto — Ĵivko Grozev, vicprezidanto — Ivan Vasilev, sekretario — Sider Rusev, kasisto — Petr Sultanov, anoj — Veska Varsanova, Evgenija Metlarova kaj Cvetana Kalajĝieva.

SVIŠTOV. La lernoĵaro en la Supera Financa Instituto jam finiĝis. La gestudentoj, kiuj tutan jaron diligente kaj senlace fakultative lernis la internacian lingvon je la ekzamenoj montris bonegajn rezultojn. Tre bone prezentis sin Toska Muŝtanova, Vasil Vladimirov, Coko Cokov k. a., kiuj ricevis plej altajn poentojn.

La varia pedagogia maniero de la instruado de E. de k-do Stojan Ilčev, gvidanto de la grupo, estas grava faktoro por la bonaj rezultoj, montritaj dum la ekzamenoj, kiuj stimulas nin al aktiva laboro por varbado de novaj adeptoj al nia movado.

Cočo Kolarov

DIMITROVGRAD. E-societo „Internacia amikeco“ okazigis sian jarkunvenon je la 12-a de marto.

La prezidanto Vlado Vâlčev tralegis la raporton por la unujara agado de la societo.

Ĉeestis gastoj el urbo Pârvomaj.

Por la estonta estraro de la societo estis elektitaj la jenaj kamaradoj: Vâlčev, Zaprjanov, Radkova, Daneva, K. Ĵekov, K. Kartulev, R. Stajkova, V. Manolov kaj aliaj.

PERNIK. La 14-an de marto ĉi-jare E-societo „Nova vojo“ okazigis sian jaran kunvenon. La prezidanto N. Mitev raportis pri la agado. Li substrekis, ke la societo ne agadis tre bone. Pli speciale, li emfazis, ke la E-kursoj ne finiĝis tro sukcese. En la diskutoj partoprenis k-do Vasev, G. Veselinov, Ĝermanov, S. Nedjalkov. Fine la ĉeestantoj elektis la novan estraron: prezidanto — N. Mitev, vicprezidanto — C. Ĉavorski, sekretario — A. Vasev, kasisto — S. Nedjalkov, ano — S. Milanov.

VELINGRAD. En la diskutoj dum la jarkunveno de E-societo „Stojo Kalpazanov“, okazinta je la 13-a de marto k. j., partoprenis K. Vaseva, N. Kolev, G. Ĵdrakova, B. Marinov k. a. La deziro de ĉiuj estis ke dum la nuna jaro la agado estu pli vigla, pli fruktodona. La novaj estraranoj estas la jenaj: B. Marinov, M. Ĉolev, M. Kolčagova, S. Salamanova, K. Vaseva, G. Ĵdrakova, N. Kolev, K. Vodeva, J. Jonkov.

DRJANOVO. En sia raporto k-do Neĵko Manev diris, ke dum la pasinta jaro la nombro de la membraro de la urba E-societo pligrandiĝis. Tamen oni pli multe devas labori por la disvastigo de Esperanto. La E-kursoj ne havis sukcesojn. La partoprenantoj en la jarkunveno elektis la novajn estraranojn — N. Manev, G. Manev, V. Ĉukova, S. Dimitrov, D. Gateva.

RUSE. La 27-an de marto ĉ. j. la E-societo „Libero“ okazigis sian jarkunvenon, kiun partoprenis la plejmulto el la anaro. La junpioniroj el la rondeto de Maria Preslavska plenumis gajan programon.

La prezidanto k-do St. Cvetkov raportis pri la unujara agado de la anoj. Li montris la sukcesojn kaj la malsukcesojn de la societo. Li emfazis, ke ĉijare la E-kursoj plensukcese finiĝis. En la diskutoj partoprenis multaj geesperantistoj — J. Kalinov, D. Ivanov, G. Bonev, D. Kolarov, M. Preslavska, H. Ivanov k. a.

La kunveno elektis la novajn estraranojn: St. Cvetkov, M. Preslavska, St. Popov, M. Marinov, D. Kolarov, M. Petrova, P. Petrova, G. Kaculov, M. Iliev.

M. Preslavska

Post la junulara festivalo en Loveĉ, la gejunuloj kaj pioniroj el Ruse revenis portante la premiojn de la dua loko kiujn prijuĝis al ili la konkursa komisiono.

En regula semajna kunveno la gvidanto de la partopreninta grupo k-do Georgi Dobrev raportis detale pri la sukcesoj kaj montris la premiobjektojn kaj librojn per kiuj abunde la komisiono rekompencis la gejunulojn kiuj serioze laboradis por inde sin prezenti en la festivala konkurso. La kunveno aplaudis la sukcesintojn kaj bondeziris al ili venontjare gajni la unuan lokon.

Boris Kavalĝiev

estraro montris la bonan kulturen laboron de la membroj. Kvar geesperantistoj partoprenis E-kongreson en Pleven, tri vizitis Pollandon dum la Internacia esperantista Ferio. Niaj membroj korespondas kun 46 gesamideanoj el 11 landoj. Estis preparitaj 4 vitrinoj kaj organizitaj 3 kursoj por komencantoj kun 32 partoprenantoj.

La ĉeestantoj en la kunveno aŭdis kun granda intereso kaj kontenteco la eldiron de la multjaraj esperantistoj Ivan Garvanski, Dimitr Ŝtârbov kaj Trajana Petkova, membro de CK de BEA.

Dek du el la gastoj ekvolis membri en la societo kaj lerni la lingvon.

Jordan Gruev estas elektita kiel prezidanto de la societo.

Anĉo Anĉev

ST. DIMITROV. La 27-an de marto 1966 E-societo „Marek“ havis jarkunvenon. Raportis la vicprezidanto Boris Mihajlov. Li montris la atingajojn kaj malsukcesojn. Ok kamaradoj faris eldirojn, kritikis la estraron kaj rekomendis novajn manierojn de laboro. Oni promesis helpi la estraron, aprobis la raporton kaj elektis novan estraron: Prezidanto — Bano Banov — eksfervojisto, vicprezidanto — Boris Mihajlov — eksforstisto, sekretario — Ivan Smokov — tabaklaboristo, kasisto — Hristo Lazarov — ekskontisto, anoj: Gabriela Ŝtiplieva, Ivan Karpuzov kaj Nikolaj Petrov.

La prezidanto proponis trimonatan planon laŭ kiu oni komencis labori.

Ivan Dobrovski

KUBRAT. E-societo „Progreso“ bone agadis dum la pasinta jaro — tiel raportis la prezidanto Stojan Nenov al la kunvenintaj esperantistoj je la 22-a de aprilo ĉ. j. Multaj el la anoj partoprenis la societajn aranĝojn, kiuj estis tre variaj. La ĉeestintoj esprimis deziron, ke oni devas altiri ankaŭ la junulojn al la organiza vivo. La kunveno elektis la novan estraron: prezidanto — Marin Deskov, sekretario — Hristo Dimitrov, kasisto — Ganĉo Jordanov, anoj — Irina Deskova, Ivan Alahverĝiev, Stojan Nenov, Georgi Nenkov.

PLOVDIV. La 9-an de aprilo 1966 en la III-a Medicina sanitarejo — Neŭrologia fakao oni malfermis kurson de Esperanto por komencantoj. Partoprenas 12 personoj inter kiuj la ĉefa kuracisto kun kvar aliaj kuracistoj. La ĉefo, D-ro Ilĉevski, komencis lerni la lingvon kun granda entuziasmo.

Kursgvidantino Rosica Georgieva



V. SMOLNICA, DISTRIKTO DE TOLBUĤIN. La jarkunveno de la E-societo „Amikeco“ en la vilaĝo elektis la jenajn estraranojn: J. Konstantinova — prezidantino, N. Nankov — vicprezidanto, J. Petrova — sekretariino, M. Matteeva — kasistino kaj M. Panĉeva.

MEZDRA. Je la 12-a de aprilo okazis la jarkunveno de E-societo „N. Vapcarov“. La

VARNA. La Junulara grupo „Verda Lumturo“ dum 1966 jam agas aktive. Tion asertas ankaŭ la ĵus ricevitaĵoj: Plano por agado majo-junio kaj Plano por agado dum 1966. Inter la plej interesaj iniciativoj estas jenaj: Kunlaboro kun „Studenta amikeco“ kaj konkurado kun Ruse, interŝanĝo de informoj kun alilandaj junularaj grupoj, koncertoj, regulaj kunvenoj kun prelegoj pri riĉa temaro, agado en la junpionira grupo „D-ro Zamenhof“, okazigo de letervespero, partopreno en manifestacioj, informado k. m. a.

AMIKA RENKONTIĜO

Je la 2-a de Majo, laŭ iniciato de la estraro de societo „Internacia Amikeco“ — Dimitrovgrad, estis organizita regiona E-renkontiĝo en la Monaĥejo ĉe vil. Baĉkovo.



Partoj ren'is grandaj grupoj el Dimitrovgrad, Asenovgrad, Plovdiv kaj Pärvomaj.

Ni estis varme akceptitaj de asenovgradanoj. K-do D-ro Otonov malfermis la renkontiĝon. Ĉiuj grupoj plenumis programojn. K-do Ŝiŝkov el Pärvomaj tralegis kelkajn, tradukitajn de k-do Asen Grigorov versaĵojn. Post tio kune ni pririgardis la Monaĥejon kaj la ĉirkaŭaĵojn de la urbo kaj ĝoje pasigis la tutan tagon sur la belegaj verdaj herbejoj en la arbaro, apud la bruanta rivero Ĉaja.

La geesperantistoj interkonatiĝis, interŝanĝis sperton, por puŝi la E-movadon antaŭen.

Kirĉo Kartulev

Prezidanto de la junulara sekcio ĉe s-to „Internacia Amikeco“

JARKUNVENO EN ŜUMEN

Antaŭ nelonge la E-societo „Vekiĝo“ havis sian jarkunvenon.

Bonajn preparojn anticipe faris ĝia estraro. Kelkajn tagojn antaŭ la kunveno la aktivaj membroj Rajna Kasabova, Neli Marova, Nadejda Konjarska, Ivanka Dimitrova kaj Cvjatko Todorov plenumis konvenan programon pere de la urba radioreto.

En la tago de la kunveno estis aranĝita bela ekspozicio en kiu per abundaj materialoj oni konstatis la atingojn en la korespondado kun alilandaj esperantistoj el ĉiuj partoj de la 5 kontinentoj

Estis eksponitaj sonbendoj el Japanujo, Hungario per kiuj niaj korespondantoj rakontas, kantas, ludas je piano, gitaro ktp. — efektive realigas la amikecon inter la popoloj.

Interesa kaj enhavoriĉa estis la raporto de la estraro, farita de la vicprezidanto — K. Bogutinski.

Bone laboris la estraro kaj membraro dum 1965 jaro, kiu estis jubilea por ni. Ja ni solene festis la 60-jaran datrevenon de la fondiĝo de la societo, 60 jarojn kultur-kleriga agado — laboro por paco kaj amikeco inter la popoloj!

Tri grupoj da esperantistoj gastis al siaj korespondantoj en Hungario, Pollando kaj GDR — kaj al la societo gastis esperantistoj el Hungario kaj Anglio.

La kunveno unuanime aprobis la raporton, akceptis rezolucion pri la estonta laboro de la societo.

Estis elektita nova estraro kaj kontrolkomisiono.

La kunveno akceptis per aplaŭdoj salutleteron-promeson al CK de BEA kaj Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio.

Ni sendis ankaŭ al la Nacia komitato por defendo de la paco — en Sofio — telegramon, per kiu ni kolere protestas kontraŭ la agresa milito de la Usona imperiismo en Suda Vjetnamio, kaj la ĉiutagaj bombadoj de N. Vjetnamio.

Dum la nova jaro ni daŭrigos la batalon por paco kaj amikeco inter la popoloj.

A. Laborov

FRATA KUNLABORADO

Antaŭ nelonge la esperantistoj el Skopje sendis alvokon al ĉiuj E-societoj en la mondo, petante helpon por restarigi ilian bibliotekon detruitan dum la granda tertremo. Tiu alvoko atingis ankaŭ nin. Ni tuj volonte decidis frate helpi niajn makedonajn amikojn. Je la nomo de la societo ni sendis pakajon entenantan la librojn „Sub la jugo“ kaj „Bulgara prozo“. Ni metis ankaŭ leteron en kiu ni rakontis pri nia agado, pri la nova vivo en nia belega Patrujo, ni esprimis nian fratan esperantistan solidarecon kaj deziris sukcesojn al ĉiuj esperantistoj en najbara socialisma Jugoslavio.

Post du semajnoj ni ricevis leteron el Skopje. Kun granda ĝojo kaj sento de plenumita devo ni ĝin legis kaj relegis. La letero kvankam mallonga estis varma, frata kaj parolis multe. La esperantistoj el Skopje skribas al siaj bulgaraj kunfratoj: „Karaj amikoj kaj kamaradoj, je la nomo de ĉiuj esperantistoj el Skopje akceptu nian fratan dankon pro via valora donaco! Kun ĝojo ni devas sciigi al vi, ke multaj esperantistoj el tuta Eŭropo akceptis kun preteco nian peton. El frata Bulgario ankaŭ ni ricevis helpon de kelkaj societoj, inter kiuj estas kaj la via.

Via helpo estas duoble granda por ni, ĉar nin ligas ne nur la internacia lingvo, sed ankaŭ nia komuna batalo por konstruado de la socialismo kaj defendo de la Paco.

Ankoraŭ unufoje nian sinceran esprimon de estimo kaj niajn sincerajn salutojn!“

Tiel praktike la esperantistoj en Ŝumen efektivigas kunlaboradon kaj amikecon inter la popoloj.

Cvjatko Todorov

DISTRIKTA KONFERENCO EN RUSE

La 17-an de aprilo ĉ. j. okazis la unua distrikta jarkonferenco. Ĉeestis delegitoj el la 5 urbaj societoj: „Libero“, „Dimitrovec“, „Ponto de la amikeco“, studenta kaj aŭtotransporta. Reprezentantojn sendis la grupoj en la vilaĝoj: Dve Mogili, Borovo, Batiŝnica, Bjala k. a. K-do ing. S. Simeonov el Sofio, reprezentanto de CK de BEA, esprimis per sia ĉeesto la atenton kaj ties intereson.

La konferenco pasis je alta nivelo kaj laŭ pritakso de ing. Simeonov sukcesis kiel brila, serioza kaj utila kaj per siaj decidoj, rekomendoj povas esti ekzemplo imitinda por aliaj distriktoj.

La prezidantaro de la DK k-do Hristov proponis kaj oni elektis prezidanton de la konferenco k-don Stojan Cvetkov, prez. de „Libero“.

En la prezidantaro okupis lokojn la pioniro D-ro Z. Boĉev el Dve Mogili kaj ing. Simeonov el Sofio.



Laŭ la tagordo la prez. de DK k-do Hristov voĉlegis detalan raporton, k-dino M. Preslavska la projektodecidojn.

En la diskutoj partoprenis multaj delegitoj. Ĉiuj bone komprenis la signifon kaj la utilon de la konferenco kaj la nova maniero de agado, Plej bone parolis kaj proponis novajn metodojn pri agado k-do: D-ro Boĉev, J. Kalinov, M. Marinov, ing. J. Kazakov, kiu raportis pri la kongreso de STELO en Ruse. La konferenco akceptis saluttelegramojn al CK de BKP kaj BEA kaj protesttelegramon al la usona ambasadoro en Sofio pro la barbara milito en Sudvjetnamio.

La konferenco decidis fondi Instr. Esp. sekcion kaj organizi kurson por instruistoj.

K-do ing. S. Simeonov konstatis la seriozan laboron de la konferenco kaj promesis detale raporti al CK de BEA pri la altnivela konferenco en Ruse.

Post la elekto de la nova komitato la ĉeestantoj faris komunan foton.

B. P. Kavalĝiev



Geedziĝa festo de G. Dimitrov, esperantisto el Ruse

Samokov. La 26-an de marto 1966 okazis la jarkunveno de E-societo „Rila Esperantisto“. Multaj el la ĉeestantaj membroj partoprenis en la diskutado de la raporto.

Oni elektis novan estraron.

MARICA. La 8-an de aprilo 1966 okazis la jarkunveno de E-societo „Trakia lumo“.

La jarraporton legis la prezidanto k-do Todor Kurtev. Li emfazis ke la societo estas nova, sed progresas. Bone funkcias kurso kun 15 gekursanoj. Preskaŭ ĉiuj korespondas kun diversaj landoj. Tio evidentiĝas de la ekspozicio, kiun ni aranĝis.

La prezidanto de la revizia komitato ankaŭ legis sian raporton. En la fino gekursanoj plenumis malgrandan literaturan-muzikan programon. La societo havas propran klubojn en la centro de la urbo, dank' al la helpo de la urba komitato de BKP kaj la urba konsilantaro.

La fakto, ke la prezidanto de la urba konsilantaro k-do Dojĉev ĉeestis nian kunsidon antaŭ la jarkunveno, atestas ke ni havas fortan subtenon.

La novelektita estraro estas: prezidanto — Todor Kurtev, sekretario — At. Delĉev, kasiŝto — Kiĉka Nalbantova, membroj: D-ro G. Georgiev kaj Hr. Laĉev.

At. Delĉev

E-RENKONTIĜO EN VIDIN

La 30-an de aprilo en Vidin okazis renkontiĝo de esperantistoj el Ruse, Orjahovo kaj Vidin. La gastoj — 30 personoj — alvenis per vaporŝipo posttagmeze. Ni renkontis ilin kun floroj enmane. La verdajn flagetojn oni povis vidi de malproksime. Ĝojinde estas renkonti geamikojn, kiuj vivas kun la grandaj idealoj por Paco kaj Amikeco inter la popoloj.

Vespere okazis amika vespermanĝo en la restoracio „Danubo“. Post la vespermanĝo la plej maljuna esperantisto G. Stanev el Orjahovo rakontis siajn rememorojn pri la universalaj kongresoj. La vicprezidanto de E-societo en Vidin G. Simeonov salutis la gastojn, dezirante al ili agrablan pasigon en la antikva urbo kaj esprimis la ĝojon, ke ni metis la unuan ŝtonon por pli oftaj renkontiĝoj de la esperantistoj el la apuddanubaj urboj. Je la nomo de la amikoj el Ruse respondis k-dino Preslavska. Ŝi elkore dankis al la gesamideanoj el Vidin, kiuj amike renkontis nin kaj faris ĉion eblan por ke ni bone pasigu la tagojn ĉi tie.

La Unuan de Majo grupo da 50 geesperantistoj partoprenis la solenan manifestacion, portante portreton de D-ro L. L. Zamenhof kaj sloganon „Per Esperanto al Tutmonda Paco“. La geurbanoj aplaudis nin preterpasante la tribunon, kie estis la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj. Posttagmeze la gastoj vizitis la urban muzeon kaj la fortikaĵon „Baba Vida“.

Poste la grupo kolektiĝis en iu klubejo de Patrolanda Fronto por interŝanĝi sperton.

La renkontiĝon malfermis la prezidanto de E-societo en Vidin k-do Ignat Nikolov. Li denove bonvenigis la gastojn kaj rakontis pri

sia laboro. Tre malbone estas, ke ni ne havas propran klubojn, pro tio ni ne vivas plenan organizan vivon, diris li.

Poste k-do H. Hristov, prezidanto de D. K. en Ruse, tre detale informis la geamikojn pri la agado de la societoj en Ruse. Tie oni havas 5 societojn kaj ĉiu societo funkcias laŭ sia aparta organiza vivo. Ĉiuvespere nia klubejo estas plenplena de esperantistoj: kursoj por geurbanoj, gejunuloj, fervojistoj ktp.

K-do G. Stanev el Orjahovo parolis pri la malfacilaĵoj en ilia E-societo, kie oni ankaŭ ne posedas propran klubojn.

D-ro Z. Boĉev el vil. Dve Mogili rakontis, kiel per obstina laboro li atingis bonan rezulton. Nun tie estas grupeto da esperantistoj. K-do G. Simeonov parolis pri ĝeneralaj problemoj: pri la kursoj, lernolibroj, nacia kongreso k. a.

Je la nomo de la renkontiĝo la prezidanto proponis du telegramojn: unu al CK de BEA kaj la alia kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio.

Vespere denove okazis komuna vespermanĝo en restoracio „Danubo“. Ĉirkaŭ meznokte la gastoj kaj dommastroj disiĝis kore, dezirante denove interrenkontiĝi nun en Ruse.

G. Simeonov

ĜOJIGAJ NOVAĴOJ EL LA DISTRIKTO DE SMOLJAN

La rezolucio de la fonda konferenco de Distrikta E-Organizaĵo prezentas vastan programon por progresigo de la movado en la tuta distrikto. Dank' al la persista laboro de la Distrikta Komitato ĝi estiĝas jam reala fakto.

Renovigita estas E-societo „Rodopa stelo“ en kvartalo Rajkovo de urbo Smoljan.

Fonditaj estas novaj E-societoj: en kvartalo Ustovo de urbo Smoljan, kies nomo estas „Bratan Ŝukerov“, la nomo de fama partizano-esperantisto; en urbo Ĉepelare, vilaĝo Ŝiroka Lâka kaj vilaĝo Mugla.

Esperiga estas la fakto, ke ĉiuj novaj E-societoj en siaj fondaj kunvenoj akceptis rezoluciojn por fruktodona laboro dum 1966 j.

Estas ĝojiga ankaŭ la fakto ke ĉiuj E-societoj kolektis la membrokoton por la tuta 1966 jaro.

Por garantii bone preparitajn inst-

ruistojn DK de BEA dum la somero sendos studi en Druĵevo 8 geesperantistojn, kies kotizon pagos DK.

La junaj geesperantistoj sendos siajn reprezentantojn al la Internacia Junulara E-brigado en nia iama ĉefurbo Veliko Târnovo.

En 1967 E-movado en la distrikto de Smoljan solene celebros sian 40-jaran jubileon.

Ĉi-okaze oni intencas eldoni jubilean albumon.

Konekse kun tio DK petas tiujn, kiuj scias ion pri E-movado en la distrikto de Smoljan skribi siajn rememorojn kaj kune kun eventualaj poseditaj fotografiaĵoj kaj dokumentoj sendi ilin al DK de BEA en Smoljan.

DK ankaŭ sukcese solvas la taskojn por la kreskigo kaj fortikigo de Bulgara Esperantista Kooperativo. Oni varbis 10 geesperantistojn kiel novajn membrojn kun 30 lv. da kooperativa membrokoto.

Jordan Jordanov

JARKUNVENO DE E-SOCIETO „MAKSIM GORKIJ“

En aprilo Sofia E-societo „Maksim Gorkij“ okazigis sian jarkunvenon.

La prezidanto de la societo k-do N. Nanov informis detale pri la sukcesoj kaj mankoj de la societo dum la raportata periodo. Evidentiĝis ke la societo bone laboris kaj atingis sukcesojn, sed malkaŝe oni parolis ankaŭ pri la mankoj.

La kulturklerigan agadon de la societo oni povus plibonigi kaj la rezolucio montras la vojon de tiu plibonigo. Laŭ la proponoj kaj rekomendoj oni devas plivastigi kaj variigi la temaron, ĉar „M. Gorkij“ estas la loko kie oni venas por aŭdi ion novan, ion interesan. Uojiga fakto estas la pliboniginta financa stato de la societo, kiu jam havas stencillaborejon, kiu estas fonto de monrimedoj. Laŭ la raporto de la kontrolo komitato la fi-

nanca stato de la societo estas senriproĉa kaj en ordo.

Sekvis tre interesaj eldiroj. Oni tuŝis la demandojn pri konstruo de propra E-domo. Evidentiĝas ke la tasko ne estas facile realigebla. Domo de Sofiaj esperantistoj estas ege necesa. Do, oni faris bilancon de unujara E-agado.

Fine oni reelektis preskaŭ la ĝisnunan estraron. La prezidanto restis la sama — k-do N. Nanov. Al li kaj al la ceteraj estraranoj oni deziris fruktodonan laboron.

P. Ĉakova

Ĉirpan. La 18-an de marto 1966 j. en unu el la klasĉambroj de la Vilaĝmastruma Teknikumo pri vitkulturado kaj vinberproduktado okazis la jarkunveno de E-societo „Mondamikeco“. En sia raporto la prezidanto Petr Ŝoparov rakontis pri niaj sukcesoj dum la pasinta jaro. Nun bone funkcias tri kursoj: unu en la Junpionira Domo kun kursgvidanto k-do Ivan Peev, dua por civitanoj kun kursgvidanto Taŝko Georgiev kaj tria en la Vilaĝmastruma Teknikumo kun 120 gelernantoj kaj kursgvidantino Nevena Vâlkanova. Post la raporto okazis vigla diskutado. La reprezentantino de la Distrikta E-komitato en Stara Zagora Irina Markova esprimis sian kontentecon pro la bona laboro de nia E-societo.

Oni elektis novan estraron: prezidanto — Petr Ŝoparov, ĉefa mekanikisto en uzino „Bâdaŝnost“ kaj sekretario Petko Denev, inĝeniero en la sama uzino.

Elago Dimitrov

Pârvomaj. La 27-an de marto 1966 okazis la jarkunveno de E-societo „D-ro Zamenhof“.

Estis elektita nova estraro de la societo: prezidanto — Cvetil St. Cvetilov, sekretario — Dobrinka Ljanguzova.

ESPEPANTO EN PRAKTIKON!

Ĵus aperis multkolora teknika prospekto ekipita per multaj fotografiaĵoj. Tiu ĉi prospekto temas pri ceramika maŝinaro, sanitara ceramikaĵo, ceramikaj produktaĵoj kaj elektro-porcelano fabrikataj en Ĉeĥoslovakio. Interesatoj el la tuta mondo povas ricevi ĝin kontraŭ rekompenco libervola.

Bonvolu skribi al la jena adreso:

ZK Esperanto, Prerovské strojírny, Prerov — Ĉeĥoslovakio.

Окръжен народен съвет
отдел „Народна просвета“
№ 65/28. III. 1966 г.
гр. Хасково

До другаря Директор
на народно основно
училище

.....
.....
гр. (с.)
Хасковски окръг

В много училища и висши учебни заведения в чужбина и у нас години наред се изучава международният език есперанто като редовен или факултативен учебен предмет. В Софийския държавен университет и във висшите учебни институти във Варна и Свищов има катедри по езика есперанто.

Министерството на народната просвета удовлетворява исканията на училищата за преподаване на есперанто.

Отдел „Народна просвета“ при ОНС — Хасково и есперантското дружество като имат предвид нарастващия интерес всред учащите се и гражданите към международния език есперанто и че този език намира все по-широко приложение в международното общуване и сътрудничество

РЕШИХА:

Да открият през лятната ученическа ваканция 20-дневен курс с учители за подготовка на преподаватели по есперанто.

Курсът ще се проведе в гр. Хасково. Нощуването на курсистите ще бъде безплатно в ученическо общежитие. Храненето ще става в стола на Окръжния народен съвет срещу заплащане от самите курсисти. Времето прекарано в курса ще се зачита за работно време.

Завършилите успешно курса ще добият право да бъдат преподаватели по есперанто.

Напратете горното достойние на всички учители от повереното Ви училище. Проагитирайте по-добри учители да пожелаят да завършат този курс, за да можем чрез тях впоследствие да увеличим есперантистите в окръга. В срок до 30 април съобщете в отдела имената на желаещите да следват курса. Допълнително ще бъдат уведомени кои от тях са приети в курса, от коя дата ще започнат занятията и в кое помещение ще се водят.

Началник отдел „Народна просвета“:

Г. Йовчев

Председател на есперантското д-во:

Г. Идакиев

До др. Директор
на основното у-ще
„Васил Левски“
в гр. Русе

копие: др. Началник на отдел
Народна просвета при
Окръжния народен съвет
в гр. Русе

Др. Директор,

Пионерският художествен колектив при повереното Ви училище с ръководител учителя Пено Йорданов Ментов изнесе на 20. II. 1966 г. в гр. Бяла във връзка с изборите програма, която остави у нас незаличими спомени.

Възхищаваме се от прекрасното изпълнение на малките артисти, които влагаха в игрите нежно чувство, удивителен ритъм със завидно художествено майсторство. Още няколко стъпки и този прекрасен пионерски колектив би представлявал с чест нашата родина на най-големите световни подиуми. Още повече ни зарадва фактът, че този детски колектив ползува есперанто, което е дало основание той да бъде взет под шефството на Окръжния комитет на Българския есперантски съюз в Русе.

Ние считаме, че пионерският художествен колектив трябва да върви напред в своето езиково и художествено усъвършенстване и трябва да бъде изпратен на младежкия фестивал в Ловеч 2—4. IV. т. г. и след това в Световния есперантски фестивал в Будапеща от 30. VII.—5. VIII. 1966 г. В Будапеща децата ще прославят не само своето училище, своя окръжен комитет, не само своя град, но и нашата мила родина.

Д-р Захари Бочев,
секретар на есперантското д-во
„Д-р Заменхоф“
с. Две Могили, Русенско

В резолюцията на IX конгрес на Съюза на българските филателисти бе решено ръководството чрез пряк контакт с Българския есперантски съюз да потърси и проведе някои форми за съвместна работа между филателните и есперантските дружества в тяхната културнопросветна и организационна дейност.

Неотдавна между ръководните фактори на двата съюза бяха разменени писма, с които бе даден израз на пълна готовност да се започне такава дейност.

През първите дни на м. март между главните редактори на „Филателен преглед“ и „Булгара есперантисто“ се състоя среща, на която бяха набелязани някои основни въпроси за сътрудничество между двете редакции. На последвалата след това среща между представителите на двете организации бе постигнато съгласие:

1. В близко време представител на Българския есперантски съюз да изнесе пред членовете на софийското филателно дружество беседа за възможностите и начините за взаимна ползотворна работа между есперантисти и филателисти.

2. Представители на Софийското филателно дружество да изнесат беседа пред членовете на Софийското есперантско дружество „Максим Горки“ на тема „Филателията и международният език есперанто“.

3. Да се дават и редовно разменят информативни материали между сп. „Филателен преглед“ и „Булгара есперантисто“.

4. Да се иска от ИБ на СБФ и Бюрото на БЕС да излизат с нарочни окръжни до съответните дружества за взаимна дейност.

Иван. Н. Даскалов

Чрез есперанто стана побратимяване на техникумите по текстил в гр. Сегед, Унгария, и гр. Враца, България.

Като взехме предвид общата цел, че даваме на нашите отечества обучени, образовани и висококвалифицирани технически кадри, които се вливат в текстилното производство, ние побратимяваме нашите две училища съгласно следните показатели:

1. Да обменяме чрез есперанто широка лична и колективна кореспонденция между учащите се и учителските колективи.

2. Да разменяме албуми с мостри и други материали за обмяна на производствен опит.

3. Да обменяме опит в обучението по тъкачество и предачество, за възпитанието на нашите кадри, и за приложение на най-новите методи в педагогическата практика.

4. Да разменяме взаимно ученически групи за производствен стаж и специализация.

Опознаването на нашите учителски и ученически колективи ще допринесе те да заживеят в мир и дружба, братски, за да преуспява нашето благородно учителско дело, да обучаваме висококвалифицирани кадри.

Техникум по текстил	Техникум по текстил
Сегед, Унгария	Враца, България
Роман Гиорги	Петрана Андреева
Ръководител на завода	Директор на техникума
Йакоб Иштван	Еньо Даскалов
Директор на техникума	Предс. на еспер. група

UTILIGO DE ESPERANTO

Mi kun s-nino V. Jovčeva vizitis Greklandon per „Balkanturist“.

Kompreneble mi havis grandan deziron renkontiĝi kun grekaj geesperantistoj. Kaj mi realigis mian deziron.

En Tesaloniko mi konatiĝis kun D. Vlahopoulos, Tsaousoglou kaj D-ro Mildwurf el Londono. Nia interparolo estis por mi mia unua utiligo de Esperanto en eksterlando. Kun granda ĝojo mi rimarkis, ke mi povas interkompreniĝi nur per Esperanto, malgraŭ ke ni estis de tri diversaj nacioj. D-ro Mildwurf rakontis, ke li partoprenis la Konferencon en Vieno kaj tie renkontis kelkajn bulgarajn konferencanojn. Eksciinte, ke mi estas nova esperantistino oni demandis min kiom da tempo kaj kiamaniere mi lernas Esperanton. Mi respondis, ke mi lernis dek monatojn en kurso, gvidata de Simeon Ĥesapčiev. Evidentiĝis ke la Tesalonikaj geesperantistoj konas Ĥesapčiev kaj lian instrumentodon. Mi diris ankaŭ, ke mi vizitas la kunvenojn de E-societo „Maksim Gorkij“, kies ano mi estas; ke la Societo seninterrompe kunvenas dum la tuta jaro.

En Ateno ni renkontiĝis kun Georgios Mingas. Kun granda plezuro li helpis ne nur al ni, sed ankaŭ al aliaj bulgaroj-neesperantistoj. Dank' al li la lastan vesperon ni kunvenis en la hotelo. Venis familio Sakellaropoulos, la edzino — denkuracistino, la edzo — advokato, kun sia filino.

Ni esprimis niajn impresojn pri ĉio, kion ni vidis en Grekujo, pri E-movado en Greklando kaj Bulgario, pri nia laboro ktp. Atenaj geesperantistoj kun ĝojo sciigis al ni, ke la nombro de la esperantista anaro plimultiĝis je ĉirkaŭ 200 personoj. Ni adiaŭis kun espero, ke ni revidos nin en Budapeŝto, kiel kongresanoj.

Preskaŭ ĉiuj personoj kun kiuj ni konatiĝis estis vizitintaj nian landon, kaj kelkaj el ili esprimis deziron de-

nove viziti Bulgarien.

Kun plezuro mi transdonis la salutojn de la grekaj esperantistoj al iliaj bulgaraj amikoj.

Mi dankas al la geamikoj el Greklando kaj kun ĝojo mi rememoras pri ili.

Liljana Moralieva

KION POVAS FARI LA ESPERANTA INSIGNO

Tio okazis en aŭgusto 1965 jaro. Ni, grupo da bulgaraj esperantistoj veturis al Hungario por la dua esperantista renkontiĝo en urbo Szolnok. Preskaŭ ni ĉiuj por unua fojo veturis eksterlanden. Trapasinte la landlimon de Ruse al Bukureŝto, ni eksentis kiom multe estas necese posedi fremdan lingvon. Jam de Gjurgevo ni komencis aŭdi la nekonatan rumanan lingvon.

En la stacidomo de Bukureŝto dank' al la surskriboj en rusa lingvo ni komprenis kie povas ŝanĝi monon kaj lasi la pakaĵojn. Pro tio ke la vagonaro al Hungario ekveturas je 22 horo, ni disponis 12 horojn, kiujn ni deziris eluzi por trarigardi la urbon.

Ni provis demandi rumajn civitanojn per kiu tramo aŭ aŭtobuso ni povas iri al la centro de la urbo. Post egaj malfacilaĵoj finfine tion ni komprenis. Elirinte el la aŭto ni komencis demandi pri la fervojoficejo por aĉeti plackartojn, kiun ni trovis. En la granda salono estis multaj giĉetoj kun vicoj da nomoj. Ni ne povis kompreni kie atendi, sed ni enviciĝis antaŭ unu giĉeto. Ĉirkaŭ ni aŭdiĝis nur la rumana lingvo. Hezitante, ni decidis atendi.

Ni provis demandi bulgare aŭ ruse, sed... nenian sukceson. Neniu komprenis nin. Iuj parolis, estis tre afablaj, sed ni nenion komprenis. Inter homoj ni sentis nin kiel en... dezerto.

Subite mi aŭdis:

— Sinjoro, ĉu vi estas esperantisto? (Mi portis esperantan insignon).

— Jes, mi estas esperantisto.

Ni interkonatiĝis kaj komencis paroli. La atmosfero kvazaŭ heliĝis. De ni kvazaŭ falis granda ŝarĝo. Aperis homo, kun kiu ni povis interkompreniĝi.

Li estis inĝeniero Welther Ludvig, tre afabla kaj kultura juna homo. Mi diris al li de kie ni estas, kien ni veturas, kiaj estas niaj malfacilaĵoj. Tuj li kondukis nin al la giĉeto, kie ni povis aĉeti „plackartojn“, demandis la oficinon ĉu estas tiaj. Kartoj estis kaj ni enviciĝis. Dume ni daŭrigis nian interparoladon. Okazis, ke li jam estis vizitinta Bulgarien, konas multajn urbojn kaj lokojn. Baldaŭ ni sentis nin kiel bonaj amikoj. Ni parolis, parolis.

Sed ni devis disiĝi. Li konatiĝis nin kun iu

amiko, studento Bubu Tauscius, ankaŭ esperantisto.

Je adiaŭo mi diris, ke urbo Bukureŝto tre plaĉas al ni, sed. . . bedaŭrinde, ni vidis interesajn objektojn, sed ne komprenas kion ili prezentas.

Tiam la studento diris:

— Se vi deziras, je 14.30 horo mi povas esti je via dispoŝo, mi kondukos vin tra la urbo, mi klarigos al vi la rimarkindaĵojn.

Je 14.30 horo ni estis antaŭ la universala magazeno, s-ano Tauscius alvenis kaj kondukis nin tra la urbo. Li klarigis al ni kion prezentas la konstruaĵoj, la placoj, la kongresa halo, eksa kortego k. t. p. Aŭdinte esperantan

parolon, dum kelka tempo aliĝis alia esperantisto. Ni sentis nin inter amikoj, faris fotojn, kiuj estas tre karaj memoraĵoj.

Je 18.30 horo, iomete lacaj, sed tre gajaj, ni disiĝis kun nia kara samideano tre kontentaj, ke dank' al li ni povis almenaŭ iomete vidi la grandan kaj tre belan urbon Bukureŝto. La sekvan matenon ni jam estis en Hungario, ĉe novaj samideanoj.

De tiam jam pasis monatoj, sed la memoro pri niaj karaj rumanaj samideanoj estas ĉiam freŝa, ĉiam bela!

Jen, vi vidas kion povas fari la esperanta insigno!

P. Ivanov, Gorna Orjahovica

DUDEKJARA JUBILEO DE LA HUNGARA ARKITEKTURO

Antaŭ nelonge, sub la sama titolo, okazis ekspozicio en Budapeŝto. La vizitantoj, kiuj vidis ĉiujn multnombrajn fotojn kaj maketojn, povis ekhavi ĝustan ideon pri la hungara arkitekturo, evoluinta dum la lastaj du jardekoj. La ekspozicio estis malofta okazo, ĉar la originalaj konstruaĵoj mem, prezentitaj per la fotoj — la plimulto de ili novaj lernejoj, hospitaloj, kulturdomoj, universitatoj kaj ĉiuj ceteraj konstruaĵoj — troviĝas en plej diversaj partoj de la lando, tial oni ne povas vidi ilin kune kolektitaj sur unu loko, krom per fotoj.

La jubilea ekspozicio forte impresis kaj estis vere esperiga evento. Post 1945 jaro, la tradicia mondfama hungara arkitekturo akiris neimageble pli grandajn eblojn por disvolviĝo de la kreofortoj, ol iam ajn antaŭe. En la pasinteco multaj talentaj arkitektoj devis studi kaj akiri sperton eksterlande. La nova Hungario jam donis laborkampon al siaj arkitektoj. Kaj ne nur pro la fakto, ke oni devis restarigi ĉion detruitan dum la Dua Mondmilito. Eĉ oni devis konstrui ankaŭ tute novajn urbojn, kaj el ĉi tiuj grandiozaj entreprenoj unualoke staris la projekto pri konstruo de la mezhungarlanda Dunaujváros kaj ties metalprodukta uzino. Vere, tiutempe la konstruado certgrade ĝeneraliĝis — anstataŭ moderneco regis unutoneco, kaj malboniĝis ankaŭ la kvalito de la prilaborado. Estis ja, ankaŭ ne malmlutaj esceptoj, al kiuj apartenas ekzemple la Budapeŝta Popola Stadiono, konstruita en 1953. Ĝi estas unu el la plej monumentaj kaj imponaj arkitekturaj atingiĝoj en Hungarlando. Tion agnoskis ankaŭ ĉiuj eksterlandaj kompetentuloj.

Proksimume antaŭ dek jaroj finiĝis tiu ĉi transira periodo. Kaj de tiam la projektoj kaj la arkitekturo mem preskaŭ renoviĝis. Sur vastaj terenoj elkreskis vere modernaj publikaj konstruaĵoj, el kiuj multaj estas valoraj el artisma vidpunkto. Poste komencis evolui la gracia kaj moderna arkitektura stilo, kvazaŭ ia

nova koloro ĉirkaŭ la lago Balaton, la plej bela refreŝigejo de nia patrolando. En la proksima estinteco, kvazaŭ realiĝo de malnova aspiro de la hungaraj arkitektoj, aperis ankaŭ la unuaj, multetaĝaj domoj, sur kiuj trovis lokon ankaŭ la novaj dekoraciaj bel-kaj artindustriaj kreaĵoj, rezulte de akordiĝo de arkitekturo kaj belarto.

Aparte ni devas mencii pri la speciala arkitektura fako, ĉe kiu la evoluado sendube estas la plej granda — la industria arkitekturo. Pro la efiko de ĝisfundaj soci-ekonomiaj ŝanĝoj, la industria arkitekturo ricevis taskojn, kiujn en la pasinteco oni ne povis eĉ imagi. Nome, oni devas solvi la konstru-unuecon de la grandegaj novaj industriejoj, multnombraj novaj uzinoj, de la grandaj remuntejoj, energiocentraloj k. a. Dum la du jardekoj la industria arkitekturo atingis altan internacian nivelon. Tion pravas la multnombraj eksterlandaj premioj, honoradoj kaj publikadoj. Por niaj arkitektoj prezentas grandiozan taskon ankaŭ la amasa loĝejonkonstruado. Dum la lastaj dudek jaroj en Hungario estis konstruitaj pli ol 700 mil novaj loĝejoj, kaj dum la lastaj kvin jaroj daŭras la realiĝo de tiu 15-jara loĝejonkonstrua programo, kiu postulas la konstruadon de unu miliono da novaj loĝejoj. La novaj arkitekturaj formoj kaj konstruindustriaj solvoj traboras al si vojon. Tion agnoskas ankaŭ la internaciaj aŭtoritataj specialistoj.

La arkitekturo — tiu publika krea agado — tre prosperas en Hungario. La hungaraj arkitektoj estas ege talentaj, kaj ili povas realigi siajn planojn kaj originalajn projektojn, ĉar hodiaŭ jam neniuj postulas de ili devigan formon aŭ kutiman, unuforman solvon. La faktoj pravas, ke la fido kaj la honoro esprimitaj al la arkitektoj, baldaŭ alportus ankoraŭ pli bonajn rezultojn, ol tiujn, kiujn la industria arkitekturo jam atingis ĉe la samaj kondiĉoj.

Esperantigis: F. And Raŝi

Dum la disvastigo de Esperanto en la pasinteco ni ne limigis niajn penojn nur en la lando kaj nur inter niaj samnaciaĵoj. Ni serĉis kontaktojn kun la esperantistoj de la najbaraj landoj, por realigi reciprokan helpon en la komuna afero. Apartan intereson ni havis pri la disvastigo de Esperanto inter la turkoj. En Bulgario loĝas sufiĉnombra turka minoritato. Ni kun ĝojo renkontis ĉiun esperantistigon de turko ĉe ni, esperante interalie, ke tiaj samideanoj povos akceli pli intensan propagandon ankaŭ en la Turka lando.

La Studenta E-grupo ĉe la Sofia Universitato en 1910—1911 estis feliĉa havi en sia membraro ankaŭ turkon, studenton de juro, Rasimov (se mi bone memoras lian nomon), el Razgrad. Li estis aktiva laboranto por la iniciativoj de la grupo, sed poste elmigris Turkion kaj de tie daŭrigis la kontakton kun la bulgaraj esperantistoj per korespondo precipe kun Ivan Nenov — lia samurbano, same studento de juro kaj lia intima amiko. En siaj leteroj al Ivan Nenov Rasimov informis pri siaj provoj popularigi Esperanton en la turka socio. Kio okazis poste al li, dum la tumultaj historiaj eventoj, mi plu ne povis ekscii.

Post la Unua Mondmilito, ĉe la revigliĝo de la E-movado en Bulgario, denove elstaris esperantistoj el inter turkoj, loĝantaj en nia lando. Ibraim Ferikov, barbiro en Târnovo, estis sindona, brulanta pro ĝojo ke li posedas fremdan lingvon, kaj estis en korespondaj rilatoj kun mi. Sed ankaŭ lian postan sorton mi ne konas. Probable ankaŭ li elmigris en Turkion.

Aparte agema estis Ali Nazmi, instruisto en Pazarĝik. En 1923, en kongreso de la turkaj instruistoj en Bulgario, okazinta en Svištov, Nazmi prezentis raporton pri Esperanto kaj laŭ lia propono la Kongreso voĉdonis spe-

cialan rezolucion por enkonduko de instruado de Esperanto en la turkajn lernejojn en Bulgario. La decido restis sen reala apliko, tamen por tiu periodo ĝi estas simptoma. Nazmi mortis antaŭ kelkaj jaroj.

En 1932—1933 en Sofio provizore loĝis Ahmed Asker. Li lernis Esperanton kaj flame ekamis ĝin. Forta estis lia deziro fari ekzamenon pri Esperanto, ricevi diplomon por atesti sian rajton mem instrui la lingvon en sia vilaĝo. Bedaŭrinde lia deziro ne povis realigi. Grava malsano de lia patrino devigis lin urĝe reveni en sian vilaĝon.

Por disvastigo de la lingvo nature estas necesa lernolibro adaptita por la koncerna nacio. La turkoj ne havis tian. La turko Rasih Neset el Istanbul petis permeson adapti mian lernolibron por turkoj, per letero de la 22. IX. 1932 :

... „Sed por ke ni prosperu en nia afero ne estas necesa nur nuda Esperanta propagando; necesaj estas ankaŭ Esperanta literaturo, Esperanta lernolibro. Bedaŭrinde en nia lando simila lernolibro ankoraŭ ne ekzistas. Nun, foliumante diversajn lernolibrojn, inter kiuj ankaŭ la vian, ni povis konstati, ke via lernolibro „Kurso de Esperanto por Bulgaroj“ estas plej taŭga por traduki kaj taŭgigi ĝin, ke ĝi fariĝu ankaŭ „Kurso de Esperanto por Turkoj“. Kaj ni tradukis kaj taŭgigis ĝin por tiu ĉi celo“.

Mi ne prokrastis doni mian konsenton. Tamen respondon mi ne ricevis kaj mi ne povis scii kio okazis pri la iniciativo de R. Neset, ĝis el letero de Ahmed Asker mi komprenis:

„Mi ricevis leteron de nia amika samideano S. Rasih el Istanbul, en kiu li skribas, ke ili provis eldoni lernolibron Esperanto-turkan, utiligante vian lernolibron, sed por bedaŭro ili ne povis presigi ĝin pro manko de mono, ankaŭ la libristoj ĝin ne aĉetis de timo

por ke ili ne perdu ĝin vendante". (Letero de 17. II. 1933).

Kun mi estis en korespondo ankaŭ turka esperantisto el Ankara; pli malfrue mi ricevis kelkajn leterojn de bulgaro-esperantisto, laboristo en Ankara, kiu skribis, ke tie laboras kelkaj bulgaroj, iuj el ili esperantistoj, aliaj dezirantaj lerni la lingvon, kaj ili deziras agi ankaŭ por disvastigo de Esperanto inter la tieaj turkoj.

Ne nur bulgaraj esperantistoj interesiĝis pri la Movado en la najbaraj landoj kaj deziris akcele helpi ĝin. La Rumana Esp. Societo organizis en 1912 (de la 7-a ĝis la 14-a de Aprilo) ekskurson al Konstantinopolo (nun Istanbul). La celo estis ne nur agrabla vizito al vidinda antikva urbego, sed kune kun tio ankaŭ vigligo de la neforta Movado en Turkio. La ekskurson partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj. En Konstantinopolo renkontis ilin nur du turkaj esperantistoj. La organizintoj raportas: „Tamen ni sukcesis interesigi kelkdekon da turkoj kaj alilandanoj". (Danubo, II, n-ro 4/5, Marto-Aprilo 1912).

Ni vidas do, ke inter la turkoj ne mankis fervoraj esperantistoj, kiuj estis pretaj labori kaj oferi por krei en Turkio Esperanto-Movadon. Ankaŭ nun ne mankas tiaj. Kun ĝojo mi legas en la Jarlibro de UEA la liston de delegitoj en la Turka lando — bedaŭrinde nur en 4 lokoj. Tio ja ne sufiĉas, malmulta estas. Sed ni devas scii en kiaj malfavoraj cirkonstancoj ili devas labori. Ili certe bezonas kaj meritas apogon de la tuta Esperantistaro. Por ke ilia energio ne malfortiĝu kaj ilia kuraĝo ne estingiĝu, ili devas senti tian apogon. Por sukcesa popularigo de Esperanto estas necesaj lernolibroj, literaturo. Sed ĉu unuopuloj povus havigi al si la valorajn librojn kaj aboni la plej gravajn periodaĵojn en Esperanto?

Mi donas la suprajn notojn konkrete pri Turkio, sed la problemo estas la sama pri aliaj landoj, en kiuj ekĝermas

Esperanto-Movado (Cejlono, Hindujo k. a.).

La tutmonda Esperantistaro, reprezentata de UEA, devos trovi manieron kaj rimedojn por doni efikan subtenon en tiaj lokoj. Unu fonduso de konvena literaturo, sistemo de liverado de Esperantaj gazetoj al la malfortaj landaj iniciativoj povos doni bonajn rezultojn.

Speciale por disvastigo de la lingvo inter turkoj utilan kontribuon povus doni ankaŭ BEA, se ĝi konvinkos la ŝtatajn eldonejojn en Bulgario, kiuj eldonas librojn kaj gazetojn por la enlanda turka minoritato, presigi ankaŭ konvenan lernolibron de Esperanto por turkoj. Tia lernolibro ne nur ebligas al multaj, loĝantaj en Bulgario, lerni la lingvon, sed povas penetri ankaŭ en Turkion kaj doni bonan helpon al la tieaj pioniroj en ilia laboro por disvastigo de la Internacia Lingvo.

Feliĉe jam aperis lernolibroj de Esperanto por turkoj: en 1951 de **M. Z. Jumuk** en Istanbul — *Turklere Mahsus Esperantoca, kurs kitabo* (Kurso de Esperanto por turkoj), unua eldono, *Fakülteler matabaasi* (Presejo Fakulteler), kaj en 1965 de **Hayreddin Dural** en Ankara. La aŭtoro de la unua el ili por la dudek tri lecionoj prenis legaĵojn kaj aliajn materialojn plejparte el la bulgara Esperanto-lernolibro de Sim. Hesapĉiev, Iv. Sarafov kaj P. Kamburov (aperinta en 1948) — do ankaŭ ĉi tie bulgaraj esperantistoj donis sian, kvankam nerektan, helpon por disvastigo de Esperanto inter la turkoj. Tamen la menciitaj lerniloj ne povus facile veni en nian landon kaj utili al la turkoj loĝantaj en Bulgario. Por ebligi al la lastaj lerni la internacian lingvon, estus konvene, ke la eldono de turklingva literaturo en nia lando presigu specialan lernolibron por turkoj. Tio ĉi estu zorgo de la Bulgara Esperantista Asocio.

Sofio, decembro, 1965.

A. D. Atanasov (Ada)

REMEMOROJ PRI UNU FESTO

Ĉu vi aŭdas kiel kantas la najtingaloj, kiel la rivereto susuras?

Ĉu vi vidas tiujn du montojn kaj inter ili la dronantan en verdaĵo rondvalon?

Ĉu vi scias kiu estas tiu ĉi mirinda loko?

Se ne — venu kun mi!

Tio estas la ununura en la mondo ĉarma loko nomata Valo de la Rozoj. Ĉi tie ne nur la naturo estas belega, sed ankaŭ la klimato kaj la grundo favoras la vegetadon de la famekonata oleodona Rosa damascena.

Ni eniru la rozĝardenojn!

Purpuras la sennombraj rozfloroj Blankas la kaptukoj de la laboremaj kaj fruleviĝintaj vilaĝanoj — la kooperativanoj. Ili elŝutas la plenajn je rozfloroj korbojn en la sakojn. Sur la vojsulkoj al la distilejo grincas dekoj da veturiloj plenplenaj je rozfloroj. La ricevota de ili rozoleo glorigas Bulgarion en ĝa plej malproksima angulo de nia terglobo.

Hodiaŭ estas la tradicia Tutpopola Festotago de la Rozoj. La stratoj, la domoj kaj la placo de la vilaĝo Rozino estas ornamitaj. Flirtas diverskoloraj flagoj. Ekster la vilaĝo apud la 500-dekara rozĝardeno estas granda homamaso. Alvenas la oficialaj gastoj — ministroj, ambasadoroj, deputitoj, kulturagantoj. . . Ĉefloke staras Todor Jivkov — la unua sekretario de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj Prezidanto de la Ministra Konsilantaro de Popola Respubliko Bulgario. La oficialaj gastoj eniras la rozĝardenon kaj plukas rozflorojn. Poste kun rozkronoj ĉirkaŭ siaj koloj, la oficialaj gastoj eniras la ĉevalveturilojn ornamitajn per naciaj tapiŝoj. La granda procesio kun muziko direktiĝas al la placo de la vilaĝo kie okazas granda mitingo. En tiu momento traflugas aviadilo

kiu agrable surŝprucigas la buntan homamason per roza akvo. Parolas k-do T. Jivkov. La entuziasmigitaĵoj ĉeestantoj aplaŭdas lin. Li parolas pri la bela tradicio de la Festo, pri la rozoj, pri la paca vivo, pri la juneco kaj la amo.

Sekvas varia programo. . .

La amuzaĵo daŭras ankaŭ posttagmeze en la natura parko ekster la vilaĝo. . .

Laŭtradicie, la esperantistoj kunvenis en la kinosalono, kie okazis E-renkontiĝo.

Nevole mi ekmemoras pri la unua E-renkontiĝo en Rozino, kiu okazis en la sama salono antaŭ 8 jaroj. . .

. . . Plenuminte miajn ĵurnalistajn taskojn en Rozino mi hazarde renkontis apud la poŝtejo k-don Georgi Arnau-dov, inĝeniero, tre entuziasma esperantisto. Li sukcese gvidis E-kurson kaj fondis E-societon en tiu vilaĝo.

Parolinte pri la novaj labormanieroj en nia movado mi demandis lin ĉu mi povus organizi E-renkontiĝon en tiu bela loko. Li akceptis la ideon kaj la saman jaron dum majo ni realigis nian unuan E-renkontiĝon en Rozino. Partoprenis geesperantistoj el Sofio kun tiama prezidanto de CK de BEA G. Dolapčiev, el Karlovo, el Plovdiv k. a. .

En la amuza programo partoprenis la kulturagantoj de la vilaĝo, la prezidanto de la agrikultura kooperativo, la prezidanto de la komunumo, Patrolanda Fronto k. a. . Ili restis tre kontentaj de nia interkonatiĝo, kiun ni ŝerce nomis E-Feston de la Rozoj. De tiam komenciĝis la tradicio kiu daŭris. Kaj jen — la iama E-renkontiĝo fariĝis granda tutlanda Festotago de la Rozoj.

Ni, la esperantistoj, sentas nin feliĉaj, ĉar iniciatintoj de tiu festo estas ni. Pro tio, vice kun ĉiuj aliaj flagoj dum tiu festo flirtis ankaŭ nia verda standardo.

Pro tio ni tradicie kaj amase vizitas la Festotagon de la Rozoj kaj okazigas E-renkontigon, en majo, kiam la najtingaloj kantas, kiam la rozoj

floras kaj la aero estas saturita per odoro de rozfloroj.

En Rozino
la 29-an de majo 1966

IV. §—v

AL KREO DE VASTA MOVADO KONTRAŬ LA ALKOHOLISMO KAJ TABAKFUMADO

En la komenco de la nuna jaro en Sofio kunsidis tutlanda konferenco pri sobereco (sindeteno de uzo de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj). Ĝi elektis landan komitaton de tiu movado, en kiu estas membro ankaŭ la Prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio.

Elstaraj sociaj, kulturaj kaj sciencaj agantoj, reprezentantoj de la medicinaj rondoj kaj institucioj, juristoj, specialistoj kaj respondeculoj pri la trafiko, ekonomiistoj, pedagogoj k. a. emfazis plej kompetente kaj kategorie la egajn malbonaĵojn kaj malutilojn kaŭzitajn de la uzado de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj al la socio, la evoluigo de la produktadfortoj, la sanstato de la homo kaj lia morala fizionomio.

La plej ĉefa tasko de nia socialisma socio estas la plialtigo de la vivnivelo de civitanoj en materiala kaj kultura rilato, la edukado de novaj homoj — konstruantoj de la nova vivo, la socialisma etiko. El ekonomia vidpunkto la ĝenerala vojo por realigo de tiu humanisma ĉeftasko estas la maksimuma evoluigo de produktadfortoj de la socialisma ŝtato.

La socia lukto kontraŭ la malbonaĵoj kaŭzataj de la alkoholismo kaj tabakuzo estas bazita sur bone argumentita propaganda agado uzanta sciencajn, pedagogiajn, ekonomiajn, medicinajn ktp. konojn kaj faktojn. Ne temas pri deviga malpermeso de la produktado de la alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj, ne temas pri administra malpermeso de la uzado de tiuj produktoj. La apliko de nuraj administraj metodoj en la kontraŭalkohola lukto signifus atingi malajn rezultojn, kiel jam montris tion la praktiko de la tiel nomita „seka (senalkohola) reĝimo“ en Usono post la Unua Mondmilito.

En la nuna epoko oni devas havi antaŭvide, ke en la diversaj fakoj de la produktado eniras ĉiam pli kaj pli la nova tekniko kaj diversaj novaj teknologioj, novaj maŝinoj kaj aparatoj, estas kreaĵoj novaj produktbranĉoj. La laboristaro kaj la oficistaro devas konstante plialtigi siajn teknikajn spertojn kaj koncentrigon. La ordinara uzado (ne nur la trouzado, kiel opinias la plimulto) de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj estas malamiko de la laboristoj. Ĝi senteble malgrandigas la laborkapablecon kaj la produktivecon de la laboro, malaltigas la labordisciplinon. La uzado de alkoholaĵoj eĉ en ne tre granda kvanto ofte kaŭzas laborak-

cidentojn kaj speciale en la aŭtotransporto — la plimulton de la katastrofoj. Krom tio ne ekzistas solida baraĵo kontraŭ la transiro de la „modera uzado de alkoholaĵoj al sistema trouzado de tiuj malutilaj por la sano kaj la familia buĝeto produktadoj. La medicino delonge pruvis, ke la alkoholismo kaŭzas pezajn suferojn kaj nekuraceblajn malsanojn al la laborhomoj, kondukante al degenero iliajn generaciojn. La ĉiutaga vivo elokvente pravas la negativan influon de la alkoholismo al la nacia ekonomio kaj la familia bonstato. La alkoholismo ne nur ruinigas la personan sanon, sed ĝi ege malhelpas al la harmonia fizika kaj spirita perfektigo de la homo. Kaj la ĉiufanka evoluo de la individuo en la socialista socio baziĝas je la disflorigo de la talentoj kaj kapablecoj de la popolo, de ĝiaj spirita kaj moralaj fortoj, je la firmigo de la sanstato kaj la volo de la laboruloj.

Ĉio ĉi postulas konstante plivastigi la movadon kontraŭ la uzado kaj trouzado de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj.

Oni povas facile konstati ke la socia movado kontraŭ la uzado de alkoholaĵoj kaj tabakaĵoj estas plej intime ligita kun la fundamentaj taskoj de nia socialisma socio. La esperantistoj, kiuj estas konsciaj konstruantoj de tiu socio, ne povas en sia amaso stari flanke de la movado por sobereco vivo. En la pasinteco, kiam en nia lando ekzistis abstinenculaj organizaĵoj, la esperantistoj en sia plimulto aktive partonprenis ilin. Nun oni ofte renkontas veteranojn de la sobereco movado — aktivajn esperantistojn aŭ almenaŭ tre simpatie rilatanajn al la esperantista movado. Ekzistas certa anima parenceco (laŭ la fama esprimo de Gjote) inter tiuj du ideaj movadoj. Tial ankaŭ nun estas serĉataj aktivuloj de la movado kontraŭ la alkoholismo inter la esperantistaro kaj ĝia tutlanda organizaĵo — BEA.

Niaj societoj en urboj kaj vilaĝoj devas aktive helpi en tiu nobla agado, partoprenante la iniciatojn de la koncernaj lokaj komitatoj, la amasan propagandon, la eldonadon de presaĵoj. En la societaj kunvenoj oni povas periode informi la membrojn pri la atingitaj rezultoj kaj planitaj iniciatoj. La gelernantoj povas partopreni la kontraŭalkoholismajn klubojn, kreaĵojn en la lernejoj.

Pli speciale la esperantistoj povas organizi internacian korespondadon kun parencaj organizaĵoj en aliaj landoj aŭ liveri utilan propagandan materialon el eksterlando. Tio ne nur montros, ke la grandega plimulto de bulgaraj esperantistoj havas pozitivan rilaton al la lukto kontraŭ la alkoholismo, sed aktive en formo ligita kun ilia esperantisteco helpas al la penetrado de la kontraŭalkoholisma propagando en la vastajn tavolojn de nia popola junularo, laboristoj, vilaĝanoj, inteligentularo. La espe-

rantistoj medicinistoj, pedagogoj k. a. povas esti utilaj ankaŭ per siaj profesiaj konoj en la lukto por konservo de la sanstato kaj morala kulturo de nia popolo.

Esperantistoj, al aktiva propagand-laboro por sobreca vivo, por pli alta socia sanstato kaj kulturo!

Nikola Aleksiev

Prezidanto de BEA kaj membro de la Tutlanda Komitato por Sobreco

HEROO-INTERNACIISTO TEOFIL ANGELOV

Teofil Angelov Dašinov estas naskita je la 20-a de julio 1902 en Peŝtera. En 1921 j. oni akceptis lin en la Komsomolon. La junulo estis liberama kaj soĝa pri studo, sed li ne havis eblecon studi kaj fariĝis seruristo. La legema junulo rapide ellernis Esperanton kaj fariĝis konvinkita esperantisto kun tre viglaj korespondligoj kaj riĉa por la tiam tempo hejma biblioteko esperanta.



La junuloj-esperantistoj ĉiam povis havigi al si interesajn esperantajn revuojn, librojn de lia biblioteko. Estante soldato en la kazerno de Peŝtera dum la ribelaj tagoj de septembro 1923 j. Teofil forkuris kun 5—6 progesemaj kamaradoj de Peŝtera al Rodopi-mo-

ntaro. Post la fiasko de la Septembra Ribelo li kaŝiĝas kaj vivas eksterleĝe en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo. De tiam li fariĝis kaŝanto kaj subtenanto de alia revoluciulo el Peŝtera Sotir Anastasov-Ĉiko, kaj de la partizana taĉmento de Partâĉev.

En 1924 Teofil fariĝis membro de la laŭleĝa Labor-partio kaj estas elektita kiel delegito por la kongreso de la Partio. En la sama jaro li denove fariĝis eksterleĝa ribelanto kaj forkuris trans la suda limo en Greklandon. De tie li elmigris al USSR. En la Sovetlando Teofil havis eblecon labori kaj studi obstine teknikan superan Instituton kaj fariĝis inĝeniero.

Partopreninte en la Hispana interciivitana milito kiel volontulo por defendo de la Unua Popola Hispana Respubliko li pereis antaŭ la muroj de Madrid je la 17-a de majo 1937 j. De post tiam forpasis preskaŭ 30 jaroj. La bulgara popolo efektivigis la revon de Teofil kaj sukcese konstruas la socialisman socion en nia urbo kaj lando. La registaro de Popola Respubliko Bulgario postmorte honoris la bravan heroon esperantiston kaj internaciiston Teofil Angelov Dašinov per ordeno „Por popola libero“ kaj medalo pri partopreno en la popola ribela batalo en 1923.

Por la esperantistaro en Peŝtera li restas imitinda ekzemplo de modela batalanto-internaciisto kaj esperantisto.

Ŝterjo Kukuŝev

Като начална стъпка за провеждане уговорените между Съюза на българските филателисти и Българския есперантски съюз взаимоподпомагания за популяризиране на филателията и есперантското движение, по покана на софийското филателно дружество, на 25 април т. г. др. Иван Сарафов, главен редактор на сп. „Булгара есперантисто“, изнесе беседа за езика есперанто, за неговите положителни страни като средство за пряко разбирателство между народите и отделните хора и, най-вече, за ползата, която есперанто има за филателистите-есперантисти в тяхната кореспондентно-филателна размяна на пощенски марки по всички краища на света.

Беседата бе открита от председателя на Соф. филателно дружество др. Антон Антонов, а в края на същата, др. Иван Даскалов, член на ръководството на дружеството, благодари на сказчика от името на филателистите-есперантисти и изтъкна, че действително са на лице много факти, които говорят за близостта и практическите възможности за взаимодействие и дружеско подпомагане между есперантисти и филателисти.

Тези факти показват, че двете организации се допълват, защото, ако есперанто е език на мира, филателията е прозорец към света, а ако есперанто е ключ на земята и за него е отворен целият свят, то филателията е огледало на стремежите и постиженията на народите в техния духовен, културен и стопански живот. Есперанто и филателията се явяват като фактори за международно разбирателство, те са архитекти на световния мир и международната солидарност. Затова двата съюза следва ръка за ръка да укрепват дружеските си и организационни връзки и да популяризират идеите на двете организации с пожелание много от филателистите да изучават есперанто, а есперантистите да станат филателисти.

В близко време представител на СБФ ще изнесе пред членовете на дружество „Максим Горки“ беседа на тема „Филателията и международният език есперанто“.

Ето едно радостно начало, което обещава благотворни резултати за двете сродни организации.

Ив. Д—в

МЕТОДИКА НА ОБУЧЕНИЕТО ПО ЕСПЕРАНТО

През 1965 г. излезе книгата „Методика на обучението по есперанто“ от Иван Сарафов като издание на Българската есперантска кооперация.

Ръководството е пригодно за учители, ръководители на курсове и самоуци по есперанто. Авторът е подредил материала в десет глави: увод, проблема за международния език, цели на обучението по есперанто, методи за преподаване на есперанто, ди-

дактически принципи при обучението по есперанто, видове езикова дейност (писане, четене, превод, устна реч), учебни помагала, урокът, пробни уроци. Авторът се е спрял на различните видове методи за преподаване на есперанто: граматичен, дедуктивен, аналитико-автоматичен, междуреден (интерлинеарен), действен (на Франсоа Гуен), говорен (на Берлиц), директен (интуитивен), смесен (изборен) и

др. Особено внимание е обърнато на директния метод на Андрео Че и на неговите последователи в чужбина: Тиберио Морариу, Юлио Баги и др. и у нас: Георги Димов, Радослав Тричков и др. Дадени са положителните и отрицателните страни на метода.

Нужно е да се отбележи, че авторът е дал кратки данни за известна част от излезлите досега в чужбина и у нас есперантски учебници. Това улеснява читателя и го подпомага да се запознае макар и накратко с тези учебници, кога те са излезли, какво представляват и пр. Читателят ще узнае, че у нас е излязъл есперантски учебник наскоро след появата на есперанто, а по-късно излизат и други в превод от руския учебник на Заменхоф, от Хр. Попов и Г. Орешков (в

Пловдив през 1900 г.) и много други.

Разгледани са и дидактическите принципи при обучението по есперанто: нагледност, активност, научност, систематичност, последователност, достъпност, което говори, че авторът е вещ педагог, който познава добре не само методиката, но и дидактиката при преподаването на чуждите езици и конкретно на есперанто.

На края са дадени пробни уроци, за да се покаже как могат да се разработват есперантски уроци, които могат да послужат в помощ на учителя по есперанто. Следователно „Методика на обучението по есперанто“ от Ив. Сарафов представлява ценно помагало, методически упътвания както за учители по езика — курсови ръководители, така и за самоуци.

Йордан Атанасов, София

Novaj propagandiloj

2 ilustritaj poŝtkartoj kun teksto en Esperanto kaj bulgara lingvo — po 0.02 lv.

Poŝtkarto „Montodomo Esperanto“ — po 0.02 lv.

Kartona ŝildo „Esperanto parolata“ —

po 0.02 lv.

Emblemo sur ŝtofo „Turista sekcio Esperanto“ — po 0.40 lv.

Liveras Bulgara Esperantista Koooperativo, bul. Vitoŝa n-ro 40, Sofio.

UNUIGITA PRODUKTADA ENTREPRENEJO POR KOTONTEKSAĴOJ

„PĀRVI MAJ“ (UNUA DE MAJO) — VARNA

Telefonoj:

Direktoro 70-04

Ĉefingeniero 70-07

Vicdirektoro 70-09

Ĉefkontisto 70-17

Provizado kaj vendado 70-05

Telefona Centralo: 70-01, 70-03, 46-69, 70-08

Produktas por eksporto kaj por la enlanda merkato altkvalitajn kotonteksaĵojn kaj ŝpinaĵojn:

Oksfordŝtofo kvadratumita 70 kaj 80 cm.

Oksfordŝtofo striita 70 cm.

Oksfordŝtofo unukolora 80 cm.

Roboŝtofo „Marusja“ 70 cm.

Blankigita tolo „Vitoŝa“ 70 cm.

Blankigita tolo „Balkan“ 80 cm.

Kalikoto speciala 80 cm.

Tiko 70 cm. Nankeno kun diversaj larĝoj k. a.

Kamarado Ing. M. M. Ŝevĉenko el urbo Ust-Kamenogorsk, USSR, sendis al ni leteron konekse kun la publikigita eltiraĵo el lia letero (№ 3 de „Bulgara Esperantisto“) kun peto publikigi lian refuton. Li skribas jenon:

„Mi adresis mian leteron al k-do Rajno Iv. Ĉipilev, bulv. „Ruski“ 70, Stara Zagora, kiu estas mia korespondanto, tamen en la publikigita teksto neniuj povas trovi la aŭtentikan nomon de mia adresito. Do, la publikigita letero jam ne pli restas privata, intima alparolo al la leteramiko nome ĉe kiu mi klarigas la akireblecon de E-libroj.

„Pro tio mi estas devigata deklari, ke mia letero neniam esprimis ian peton, nek ke mia persono fariĝu objekto de iaj ajn zorgoj, nek ke miaj tute naturaj (ĉar mi estas esperantisto) trajtoj fariĝu objekto de la ajn atento de pluraj homoj, kaj mi al neniuj permesas fari tion, eĉ al tre estimata k-do Rajno Iv. Ĉipilev.

„La fakto estas miriga tiom pli, ke k-do Ĉipilev ja respondis al mi perletere, ke li sendas E-jojn kio, kompreneble, ĝojigis min kaj mi nur deziris, ke ankaŭ ĉiu mia reciproka komplezo elvoku ĉe li la saman senton.

„En mia letero mi skribis pri la pristudinda E-sperto de Bulgario, sed ne de „bulgaroj“,

kiel mi legas en la publikigita teksto; malgraŭ ke kredeble la plimulton, partoprenantan la E-agadon en la Bulgara Popola Respubliko konsistigas la bulgaroj.

„Fine, mi tute estas mirkonsternita kiel povas esti publikigita letero sen scio kaj konsento de l'aŭtoro!

„Pro ĉio ĉi dirita mi estas devigita peti la estimatan Redakcion publikigi ankaŭ ĉi-leteron; por eviti la samvoje estigitan miskomprenon kaj eventualigitajn senbezonaĵajn penojn flanke de bulgaraj ges-anoj.

„Tamen, samtempe kun tio mi uzas la okazon pere de via gazeto kaj en la nomo de la esp-stoj de nia urbo konfirmi niajn fratecajn salutojn al la esperantistoj de PR Bulgario kaj deziri al ili plurajn sukcesojn en ilia porpaca, porsocialisma agado.“

Rim. de la Redakcio. La tekston de la publikigita letero ni ricevis de k-do Rajno Iv. Ĉipilev kun peto doni lokon al ĝi en „BE“. Ni volonte faris tion, sed preterlasis peti specialan permeson de k-do Ŝevĉenko. Nun ni utiligas la okazon peti pardonon de li. Publikigante lian leteron ni opinias ke lia deziro kaj peto estas kontentigita.

KONSTANTINOS KARATOLIAS

La 24-an de marto forpasis en sia 62-jaro Konstantinos Karatolias, honora



prezidanto de la E-Ligo de Tesaloniko, persono treege estimata kaj amata, kiu multe kontribuis al la disvolviĝo de la movado en Tesaloniko. Esperantisto jam de dek jaroj, simpla membro de la Ligo komence, li tiom progresis en la studado de la lingvo

kaj tiom aktiviĝis en la movado, ke oni konfidis al li la prezidantecon de la

Ligo. Dank' al sia fervoreco kaj la rapide akirita lingvokapablo, sed ĉefe dank' al sia senfina boneco kaj mildeco de sia karaktero, li akiris la profundan amon kaj plenan konfidon de la esperantistoj. Li estis okupita pri verkado de kompleta, 700-paĝa vortaro Esperanta-greka, kiun li estis fininta kaj eldononta baldaŭ. Li multe propagandis Esperanton.

Nun li ne troviĝas inter ni. Ni forte kaj korpreneme sentas kaj sentos lian foreston. Sed lia ekzemplo restos ĉiam gravurita en niaj mensoj kiel gvidilo por unu alta kaj postulema idealo kia estas Esperantismo.

S. Sakellaropoulos

Delegito de UEA en Ateno

Je la 6. VI. 1966 forpasis samideanino **Lazarina Kânĉeva**, multjara instruistino kaj vespera lektorino en Pazarĝik, esperantistino de post 1919, kiu sindone laboris por la prospero de nia afero ĝis sia lasta elspiro. Ŝi kunlabo-

ris en „Bulgara Esperantisto“ kaj senpage gvidis E-kursojn en la loka legejo „Ĥristo Botev“.

Kondolencon al ŝiaj familianoj.

DEZIRAS KORESPONDI

Germanio

Paul Schliephak, 45 Osnabrück-Haste, Am Krümpel 14, — kun bulgaroj, interŝanĝas PK kaj PM.

Hungario

S-no Fazekas József (16-jara), Mórahalom, str. V. k. 4.

Tóth Magdolna (16-jara junulino), Mórahalom, Felszabadulás str. 14.

Nagy Imre (16-jara junulo), Mórahalom, Dózsa str. 16.

Hajdu Mária (15-jara junulino), Mórahalom, str. II. k. 59.

Mészáros Magdolna (18-jara junulino), Mórahalom, Felszabadulás str. 18.

Némát Mária (17-jara junulino), Mórahalom, Str. Szegedi 4.

Madarász Sándor (25-jara junulo), Mórahalom, str. IV k. 77.

Rigo Béláné (22-jara junulo), Mórahalom, Felszabadulás str. 2.

Rátkai Árpád (22-jara junulo), Szeged, str. Lenhyel 4.

Becksi András (10-jara junulo), Szeged, Honvéd tér 5—6.

Fülöp Mihály (10-jara junulo), Szeged, Földvári u 1.

Makó Georgina (10-jara junulino), Szeged, Lenin krt. 12.

Huszár Ildikó (11-jara junulino), Szeged, Bersenyi u 2.

Beretzki Antal (12-jara junulo), Szeged, Hunyadi J. sut. 18.

Héder Sándor (12-jara junulo), Szeged, Jósika u 9.

Simon Zoltán (12-jara junulo), Szeged, Jósika i 32.

Balla Zsuzsanna (13-jara junulino), Szeged, Hunyadi J. sut 15.

Körök Katalin (13-jara junulino), Szeged, Klauzál tér 7.

Kovács Nóra (13-jara junulino), Szeged, Kárász u 6.

Péter Edit (13-jara junulino), Szeged, Török u 7.

Szalay Ágnes (13-jara junulino), Szeged, Április 4 htja l.

Ábrahám Tibor (13-jara junulo), Szeged, Hunyadi J. sut 4.

Ábrahám Zsolt (13-jara junulo), Szeged, Hunyadi J. sut 4.

Szónyi György (13-jara junulo), Szeged, Dózsa Gy. u. 10.

Takács József (13-jara junulo), Szeged, Petőfi sut 29.

Bérczy Klára (14-jara junulino), Szeged, Marx tér 17.

Dozzi Lilla (14-jara junulino), Szeged, Kárász u 8.

Frank Ilona (14-jara junulino), Szeged, Batthány u 32.

Hegy Ágnes (14-jara junulino), Szeged, Ságvári u 6.

Majer Klára (14-jara junulino), Szeged, Kárász u 8.

Pan Julia (14-jara junulino), Szeged, Bem u 2.

Faragó Erzsébet (14-jara junulino), Szeged, Lenin krt 62.

Ókrös Ilona (14-jara junulino), Szeged, Széchenyi tér 17.

Szabo Julia (14-jara junulino), Szeged, Korányi rkp. 5.

Szecerényi Agota (14-jara junulino), Szeged, Honvéd tér 5—6.

Szontágh Lucia (14-jara junulino), Szeged, Semmelweis u 1.

Vojta Margit (14-jara junulino), Szeged, Kigyó u 1.

Pántya László (14-jara junulo), Szeged, Mikszáth u 26.

Pintér György (14-jara junulo), Szeged, Viktor Hugo u 5.

Szitzkai Sándor (14-jara junulo), Szeged, Hunyadi J. sut 35.

Ábrahám Ferenc (15-jara junulo), Szeged, Hunyadi J. sut 4.

Boda Ibolya (15-jara junulino), Szeged, Bajza u 2.

Jyhász Mária (15-jara junulino), Szeged, Viktor Hugo u 5.

Magyar Mária (13-jara junulino), Szeged, Lenin krt 12.

Makó Gabriella (15-jara junulino), Szeged, Lenin krt 12.

Kozenikái Jenő (16-jara junulo), Szeged, Honvéd tér 5.

Szaniszló Katalin (16-jara junulino), Szeged, Ságvári u 9/a.

Szirák Katalin (16-jara junulino), Szeged, Kelemen u 4.

Takács Magdolna (16-jara junulino), Szeged, Petőfi sut 29.

Gulyás Lál (16-jara junulo), Szeged, Lenin krt 61.

Gulyás Márta (16-jara junulino), Deszk, Damjanich u 26.

Italio

Franco Bazzotti (23-jara), librotenisto, Via D' Annunzio 165, Riccione — kun USSR kaj Pollando.

Anna Bondi (17-jara f-ino), Via M. Capelli, Rimini — kun Bulgario kaj Pollando.

Stefania Feligioni (16-jara studentino), Via D. Campana 8, Rimini — kun USSR.

Pollando

Jan Pawlaczyk (17-jara, lernanto), str. Warszawska 60, Łódź 11, dez. koresondi kun bulgaroj geknaboj, interŝanĝas pri muziko, sporto, vivo de junularo, kolektas BK, insignojn kaj PM.

Inĝ. Kazimierz Hrominski (28-jara fraŭlo), ul. Hufcowa 6, Miedzeszyn Nowy, Warszawa 94, serĉas seriozajn korespondantojn el la loĝlokoj de la Nigra Maro ĉe la bulgara marbordo; proponas eventuale reciproke gastadon en Warszawa — Nigra Maro.

Maryla Ryzek — Gdansk 9, ul. Jodtowa 57/3, (20-jara) kun bulgaroj.

Luĉija Zátka, Marcisrow 137, pow. Kamien-na góra, woj. Wrocław.

80 komencantoj gelernantoj, E-grupo, Ekonomia Teknika Lernejo, pl. Traugutta 1, Zabrze — dez. kor. kun ĉi; interŝ. BK, PM.

Maria Rygielska (19-jara), str. Lukaszewicza 1/107, Bydgoszcz 10 — kun bulgaroj, precipe el Sofio kaj Varna.

Rumanio

Tudor Ștefan, str. Bolintineanu 28, Băilești Oltenia — dez. kor. kun ĉi; interŝ. PM, BK kaj gramofondiskojn.

Azzola Katalin, Cluj, bul. Lenin 15, dez. korespondi kun gesamideanoj kiuj partoprenis 51-a UK en Budapeŝto.

Svedio

S-ro Bo Sandelin (23-jara studento), Lund Värvadersvägen 6 B:709, kun socialismaj landoj, pri sociaj temoj.

USSR

V. N. Filipov (malnova esperantisto), str. Tuŝaĉevskaja 6, kv. 35. Smolensk, dez. korespondi kun plenaĝa samideano el Bulgario; interŝ. BK, librojn, gazetojn, ĵurnalojn, insignojn.

Letervespero kaj ekspozicio „Esperanto estas ponto inter la popoloj“. Ni petas niajn amikojn el alilando sendi al ni PM, BK., librojn, gazetojn, ĵurnalojn, insignojn, salutleterojn. Ĉiu sendinto ricevos BK de nia urbo aŭ sov. gaz. Adreso: Viktor Zarajĉenko (por letervespero), ul. Zavodskaja 25, Rostov-Don 33,

A. J. Danilov, Sevastopol, J. Golubec 43-1.

Jefim Bogomolny, Matrosova 7, Kolomna, Moskovska oblastj.

Fratinoj Alla kaj Valja Bepalova, Leningrad D-40, do vostrebovanija — dez. interŝ. kun t. m. alumetetikadojn, fotojn de filmgeaktoroj, longedaŭrajn gramofondiskojn k. a.

Aurica Negritu, pr. Lenin 194, n-ro 3, Kiŝinevo, Moldavio — dez. kor. je diversaj temoj kun Rumanio, Francio kaj Italio.

Nataŝa Roŝka (20-jara studentino), pr. Lenin 194 n-ro 3, Kiŝinevo, Moldavio — dez. kor. kun t. m. je diversaj temoj.

Ni legas vian gazeton „Bulgara Esperantisto“. Ni loĝas en Sovetio, en Siberio, sur la bordo de la rivero Obj, en vilaĝo Aleksandrovskoe. En nia lernejo estas E-rondeto. Ĝi estas unua rondeto en la departemento de Tomsk.

Ne delonge ni organizis lernejan vesperon de internacia amikeco, en kiu ni pridiskutis la laboron de nia rondeto. Gelernantoj vidis nian agittabulon „Junaj geesperantistoj“. En nia rondeto studas la lingvon Esperanto 30 gelernantoj de 6—7 klasoj (13—15 jaraj). Ni deziras kontaktiĝi kun gesamaĝuloj el la tuta mondo. Bonvolu helpi nin.

Nia adreso: Sovetio, Tomska obl., Aleksandrovskoe, ul. Puŝkina 38, E-rondeto.

ŜTATA ALUMETFABRIKO — STACIDOMO KOSTENEC

Proponas:

Impregnitan alumeton por la enlanda merkato kaj por eksporto

Pakmaterialon

Blindmaterialon

Lignajn krucoplakaĵojn

Fummaterialon kontraŭ prujno kaj insektoj

Fajrerantajn kandletojn

Abelujojn kaj necesan ilaron por ili k. a.

Mendojn por eksporto per Ŝtata Komerca Entreprenejo „Raznoiznos“ str. Car Asen 1, Sofio.

UZINO „SÂRP I ĈUK“ STARA ZAGORA

PRODUKTADO DE :



pioĉoj, marteloj, adzoj, platpioĉoj, hakiloj, forkegoj, aksoj ŝraŭbingoj, forkoj por elektroĉaroj, feraj buloj, ĉiziloj, fer-tabulaj litoj, lit-risortoj kaj ĉiuspecaj forĝpremitaj detalajoj kaj rezervaj maŝinpartoj por maŝinkonstruaj uzinoj.

Telefonoj:

Centralo: 32-18

Direktoro: 23-27

Ĉefinĝeniero: 32-96

Liver-oficejo: 36-97

Ĉefkonfisto: 29-58


Debitejo: 38-78

Redakta komitato: Kiril DRAŬEV, Dimitr ŬDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 3-26-82

ŜTATA KOMBINUMO POR KONSERVAĴOJ

„REPUBLIKA“

urbo SVIŜTOV



PRODUKTADO DE
STERILIGITAJ VIANDAJ, LEGOMAJ
KONSERVAĴOJ KAJ KONSERVAĴOJ EL
VIANDO KUN LEGOMOJ;
TOMAT-KAĈO;
ĈIASPECAJ FRUKTOKONSERVAĴOJ —
KOMPOTOJ,
KONFITAĴOJ
MARMELADOJ
kaj
VINBERAJ KONCENTRAĴOJ
POR LA
ENLANDA KAJ LA
EKSTERLANDA MERKATOJ

